

OFICIALA GAZETO

ESPERANTISTA

ORGANO DE LA LINGVA KOMITATO
KAJ DE LA
KONSTANTA KOMITATO DE LA KONGRESOJ.

ENHAVO.

KONGRESA NUMERO

Parolado de Doktoro Zamenhof, en la Kvina Kongreso.

Lingva Komitato. — Protokoloj de la kunsidoj de la Lingva Komitato dum la Kvina Kongreso.

Konstanta Komitato de la Kongresoj. — Protokoloj de la ĝeneralaj kunsidoj de la Kvina Kongreso.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

51, rue de Clichy

PARIS

ESPERANTISTA CENTRA OFICEJO

51, rue de Clichy, Paris

KATALOGO DE LA ELDONAĴOJ

Ĉiu persono, kiu deziras ricevi akurate ĉiujn eldonaĵojn de la Centra Oficejo, aŭ nur specialan serion, tuj post ilia apero, nur bezonas por tio, sendi ian monsumon al la Centra Oficejo, kaj oni malfermos konton je ĝia nomo.

ESPERANTISTA DOKUMENTARO

I. — Oficiala Parto.

Sekcio A. Kongresoj.

	Frankoj	
Oficialaj Raportoj..	Unua Kongreso universala de Esperanto.	0 50
	Dua Kongreso universala de Esperanto	1 50
	Tria Kongreso universala de Esperanto	1 50
	Kvara Kongreso universala de Esperanto.	2 »
Fundamentaj dokumentoj pri la Konstanta Komitato de la kongresoj..	0 25	

Sekcio B. Lingva Komitato.

1. Vortoj elĉerpitaj el Hamleto kaj ne troveblaj en Universala Vortaro.	0 10
2. Pri la plenigo de la Universala Vortaro	0 10
3. Pri partcipa sufikso antaŭ verba finiĝo	0 25
4. Zamenhofaj Vortoj	1 »
5. Fundamentaj dokumentoj pri la Lingva Komitato	0 25

Sekcio C. Oficiala Gazeto.

1. Fundamentaj dokumentoj pri la Oficiala Gazeto kaj la Centra Oficejo..	0 25
--	------

II. — Historia parto.

III. — Bibliografio de Esperanto.

IV. — Statistika parto.

Esperantista Societaro.

1 ^a eldono, 30 junio 1906.	1 50
2 ^a eldono, 31 decembro 1906	1 50
3 ^a eldono, 30 junio 1907	1 50
4 ^a eldono, 30 decembro 1907	1 50

ESPERANTISTA CENTRA OFICEJO

Katalogo de la eldonadoj (*Daŭrigo*)

DIVERSAJ VERKOJ

Oficiala Protokolaro de la unua Kongreso	0 30
Detala raporto pri la unua Kongreso (<i>elvendita</i>).	
E. BOIRAC. — Le Congrès espérantiste de Genève.	0 40
La Presse et les Congrès d'Esperanto (Kolekto de plej gravaj artikoloj de la ĵurnaloj francaj kaj anglaj, okaze de la tri unuaj Kongresoj de Esperanto).	
Unua Kongreso (<i>elvendita</i>).	0 05
Dua Kongreso.	0 25
Tria Kongreso.	0 75
Baronino DE MÉNIL. — La morala edukado de la popola infano (en Esp. kaj franca lingvo, kun multaj ilustraĵoj).	1 »
Poŝtkartoj pri la unua Kongreso. La aro da 12 diversaj.	0 30
L'Esperanto et les Institutions publiques (kolekto de diversaj oficialaj dokumentoj pri Esperanto).	1 25
Bibliographie de l'Esperanto et Classification décimale universelle.	0 50

ESPERANTA GAZETARO.

[La gazetoj, kies periodeco ne estas montrita ĉi sube, aperas ĉiumonate. — La montritaj prezoj rilatas al la ĵara abono en la landoj de la Universala Poŝta Unuiĝo; kiam du prezoj estas montritaj, la unua, inter parentezoj, koncernas la abonon en la lando, kie la gazeto aperas. — La enskribitaj lingvoj estas tiuj, en kiuj la gazetoj donas tekston krom la Esperanta.]

I. — SPECIALAJ GAZETOJ

- Oficiala Gazeto Esperantista. — 5^{fr.} — 51, *rue de Clichy, Paris*.
- Bulteno de « Libera Penso ». — 2^{fr.}, 50. — R. Deshays, Sens (Francujo, Yonne).
- La Esperanta Kolektanto. — 2^{fr.} — *Weltwarte, Leipzig St.* (Germanujo).
- Esperanta Ligilo, en reliefpunktoj, por blinduloj. — 3^{fr.} — Th. Cart, 12, *rue Soufflot, Paris*.
- Dia Regno. — Ĵare, 2^{fr.}, 25. — P. Hübner, *Fr. With. Strasse, 66, Muhlheim a. Rhein* (Germanujo).
- Espero Katolika. — (4^{fr.}). 5^{fr.} — 23, *rue Joubert, Paris* (Francujo).
- Eŭropa Kristana Celado (Anglo) — 1^{fr.}, 90. — Ch. Briquet, 4, *Cite, Genève* (Svisujo).
- Export Esperantist (Anglo kaj Esp). — 2^{fr.} 50. — *Chicago, Ill. 404, Security Building*.
- Frateco (por laboristoj) (Holande). — (6^{fr.}, 50). 6^{fr.}, 75. — J. Lüneman, *van der Neerstraat 40, 's-Gravenhage* (Holando).
- Internacia Scienca Revuo. — 7^{fr.} — Internacia Scienca Oficejo, 8, *rue Bovy-Lysberg, Genève* (Svisujo).
- Internacia Socia Revuo, dusemajna. — 3^{fr.}, 50. — R. Louis, 49, *rue de Bretagne, Paris*.

Oficiala Bulteno de la Universala Esperanto-Asocio. — 8, *rue Bovy-Lysberg, Genevo* (Svisujo).

Tra la Filatelio, internacia monata organo de ĉiuj kolektistoj de poŝtkartoj kaj poŝtmarkoj. — (2^{fr}) 2^{fr}, 50. — Fize, *au Patissou, Béziers* (Francujo).

Voĉo de Kuracistoj. — 4^{fr}. — D^{ro} Stephan Mikolajski, 6, strato Sniadeckic, *Lwow* (Austrio).

II. — GENERALAJ KAJ BELETRISTIKAJ GAZETOJ

La Bela Mondo, ilustrita monata. — 7^{fr}, 50. — Emil Boden, 12, *Bismarckplatz, Dresden*.

Eĥo Esperantista. — 2^{fr}, 50. — J.-H. Schorer, *Wilhelmstrasse, 29, Berlin*.

Esperanto, dusemajna. — 3^{fr}. — Hodler, 8, *rue Bovy-Lysberg, Genève* (Svisujo).

Jen, humora gazeto. — 3^{fr}. — *Portaferrica, 17, Barcelono* (Hispanio).

Juna Esperantisto, por junuloj, instruistoj kaj lernantoj. — 2^{fr}, 50. — Presa Esperantista Societo, 33, *rue Lacépède, Paris*.

Lingvo Internacia. — 7^{fr}, 50. — Presa Esperantista Societo, 33, *rue Lacépède, Paris*.

La Revuo, literatura, kun konstanta kunlaborado de D^{ro} Zamenhof. — 7^{fr}. — Hachette, 79, *boulevard Saint-Germain, Paris*.

La Spritulo, gazeto por ŝerco, humoro kaj satiro. — 3^{fr}. — Bereiter kaj Meissner, 30, *Johannsgasse, Leipzig* (Germanujo).

III. — NACIAJ PROPAGANDAJ GAZETOJ

Aŭstralio. — **The Australian Esperantist** — 0^{fr}, 30 por ĉiu numero. — R. Dossor, *Bridge street, Benalla* (Viktorio).

Aŭstrio. **Informaj Raportoj** (Esp.). — 2^{fr}, 50. — K. F. Ahlgrimm, *Bandgasse, 31, Wien VII/1*. (Vidu ankaŭ: *Bohemujo*).

Belgujo. — **Belga Esperantisto** (Esp., Flandre kaj France). — (4^{fr}), 4^{fr}, 50. — Ox. van Schoor, 20, *Vondelstraat, Antwerpen*.

Bohemujo. — **Časopis Českých Esperantistů** (Boheme kaj Esp.). — (3 Kr.). 3^{fr}, 75. — *Praha II, Dittrichova ul 7*. (Ed. Kuhn).

Bohemujo. — **Bohema Esperantisto** (Esp., kaj Boheme). — 4^{fr}, 25. — Red., *Praha III, 495* (J. Iglauer). Adm., en *Jevičko* (Aŭstrio, Moravio).

Brazilo. — **Brazila Esperantisto** (Portugale). — 6^{fr}. — *Largo de S. Francisco de Paula, 4, Sob., Rio de Janeiro*.

Britujo. — **The British Esperantist** (Angle). — (3^{fr} il.). 4^{fr}. — *Museum Station Buildings, 133-136, High Holborn, London, W.C.*

Britujo. — **La Esperanta Instruisto** (Angle). — (1^{fr} 6 p.). 2^{fr}, 50. — *Stead's Publishing House, 39, Whitefriars street, London, E.C.*

Britujo. — **La Londona Gazeto** (Angle). — C.-A. Fairman, 70, *Romola-road, Herne Hill, London S.E.*

Ĉilo. — **Ĉilo Esperantista** (Hispane). — 2^{fr}. — *Casilla 1989, Santiago*.

Ĉilo. — **La Du Steloj** (Hispane). — 5^{fr}. — 1437, *calle de la Catedral, Santiago*

Danujo. — **Dana Esperantisto** (Dane). — 2^{fr}, 75. — *Gyldenløvesgade, 16, Kopenhago K.*

Estlando. — **Estlanda Esperantisto** (Este). — 2^{fr}, 75. — J.-A. Ruhmäg *Weike Kalamaja uul. 7, k. 2, Revel* (Rusujo).

Filipinaj Insuloj. — **Filipina Esperantisto** (Angle, Hispane, Tagaloge). — 5^{fr}. — *P. O. Box, 326, Manila*.

Finnlando. — **Finna Esperantisto**. — 3^{fr}. — Ilarejo Esperantista, *Helsingfors*.

Francujo. — **Franca Esperantisto** (Esp., kaj France). — (3^{fr}), 4^{fr}. — F. de Mènil, 4^{fr}, *boulevard Magenta, Paris*.

Francujo. — **Le Monde Espérantiste** (France). — (1^{fr}, 25). 2^{fr}. — 3, *rue Sophie-Germain, Paris*.

Francujo. — **L'Informilo** (France), jarkvarena. — 8, *rue de Rome, Calais*.

Francujo. — **Paris-Espéranto** (France). — 1^{fr}, 50. — V. Chaussegros, 3, *place Jussieu, Paris (V^e)*.

Francujo. — **Lorena Esperantisto** (France). — Esperantista Grupo en *Nancy*

Francujo. — **La Normanda Stelo** (France). — (1^{fr}). 2^{fr}, 50. — Liébard kaj Leroux, 41, *rue de la Vicomté, Rouen*.

Francujo. — **Sarta Stelo** (France). — 1^{fr}. — Lepeltier, 14, *rue Scarron, Le Mans*.

- Francujo.** — Norda Gazeto (Esp. kaj france). — 1^{fr.} — E. Deligny, boulevard Vauban, Saint-Omer.
- Francujo.** — Esperanto-Nouvelles (franco), trimonata. — 96, rue d'Alésia, Paris.
- Germanujo.** — Germana Esperantisto (Germane). — (3,05 Mk). 5^{fr.} — Möller kaj Borel, Prinzenstrasse, 95, Berlin S.
- Germanujo.** — Germana Esperanto-Jurnalo (Germane), dusemajna. — 5^{fr.} — H. Wutke, Pionierstrasse, Magdeburg.
- Germanujo.** — Mitteilungen (Esp. kaj Germane). — Dresden, 12, Bismarckplatz.
- Germanujo.** — La Esperantisto (Esp. kaj Germane). — 3^{fr.}, 50. — Talstrasse, 27, Leipzig.
- Grekujo.** — Greklingva Esperantano (Esp. kaj greke), monata. — 3^{fr.} — Grupo esperantista en Samos.
- Hispanujo** (Vidu ankaŭ: Katalunlando). — Suno Hispana (Hispane). — 3^{fr.} — Aŭgusto Jimenez Lvirá, Pintor Lopez, 3, Valencia.
- Hispanujo.** — Nova sento (Esp.), monata. — 2^{fr.}, 25. — Bilbao.
- Holando.** — La Holanda Pioniro (Holande). — (3^{fr.}, 15). 3^{fr.}, 75. — Singel, 386, Amsterdam.
- Holando.** — Esperanto-Bulletin. — Esperanto-oficejo Plauts 1-a, S'gravenhage.
- Hungarujo.** — La Pioniro (Esp. kaj hungare). — 2^{fr.} — VI, Nagymező u. 12, 1/16, Budapesth.
- Hungarujo.** — La Verda Standardo (Hungare kaj Esp.). — 4^{fr.} — A. Marich, Budapest, IX, ŭlloi-ŭt, 59.
- Hungarujo.** — Hungara Esperantisto (Hung. kaj Esp.), monate. — 4^{fr.}, 25. — Budapest, VII, Alpar-u. 8.
- Italujo.** — Notizie Esperantiste (Esp. kaj Itale). — Giovanni Castiglia, 6, via S. Agostino, Palermo.
- Katalunlando.** — Tutmonda Espero (Katalune). — 3^{fr.} — Mikaelo Cases, Paradis, 12, 1^o, Barcelona.
- Katalunlando.** — Supren (Kataluna kaj Esp.). — 2^{fr.}, 50. — Baix de Sant Pere 63, pral., Barcelona.
- Kroatujo.** — Kroata Esperantisto (Kroate kaj Esp.) — 4^{fr.} — Trg. Franje Josipa, br. 19, Zagreb.
- Kubo.** — Kuba stelo (Esp. kaj hispane). — 5^{fr.} — Calvario, A. 10, Santiago de Kuba.
- Japanujo.** — La Japana Esperantisto (Angle, Japane). — 5^{fr.} — Marunouchi, Tokio.
- Meksiklando.** — Esperanta Gazeto (Hispane). Jare, 1^{fr.}, 90. — Ap. 114, Guadalajara.
- Meksiklando.** — Meksika Revuo (Hispane). — 2^{fr.}, 50. — Cocheras, n^o 2, Mexico.
- Meksiklando.** — La Verda Stelo (Hispane). — 5^{fr.} — D^{no} A. Vargas, 3^a del Reloz, n^o 12, Mexico.
- Norvegujo.** — Norvega Esperantista Gazeto (Esp. kaj norvege). — (2^{fr.}, 10), 2^{fr.}, 80. — Søndregate, 4, Kristiania.
- Peruo.** — Antauen Esperantistoj! (Hispane). — 3^{fr.} — Ant. Alvarado, 106, calle Lartiga, Lima.
- Polujo.** — Pola Esperantisto (Pole). — 5^{fr.} — Hoza n^o 40, m. 8, Varsovio.
- Portugalujo.** — Portugala Revuo (Esp. kaj Portugale). — 5^{fr.} — 215, rua del Rosario, Porto.
- Rumanujo.** — Rumana Esperantisto (Rumane). — (4^{fr.}). 5^{fr.} — 5, strada I. C. Bratianu, Bucarest.
- Rumanujo.** — Rumena Gazeto Esperantista (Rumane). — 3^{fr.} — 1, strada Speranta, Galatz.
- Rusujo.** — Ruslanda Esperantisto (Esp. kaj Ruse). — 7^{fr.}, 60. — Nevskij, 40, Saint-Petersbourg.
- Rusujo.** — La Ondo de Esperanto (Ruse kaj Esp.). — 2^{fr.}, 65. — Tverskaja, 28, Moskvo.
- Svisujo.** — Svisa Espero (Esp.) (2^{fr.}, 50) 3^{fr.} — 8, rue Bovy-Lysbeg, Genève.
- Usono.** — Amerika Esperantisto (Angle). — 5^{fr.}, 20. — American Esperantist Company, 186, Fortieth street, Chicago.
- Usono.** — The Esperanto News (Angle), monatduona. — 5^{fr.}, 20. — 10 Wal street, Room 510, New-York.
- Usono.** — The Esperanto Student (La Studento de Esperanto) (Esp. kaj Angle.) — 2^{fr.}, 50. — John H. Brown, 23, Meadow road, Rutherford Usono, Jersey).
- Usono.** — La Simbolo (Esp.). — 6^{fr.}, 25. — Symbol Publishing C^o, Taconia, Wash.

BUREAU BIBLIOGRAPHIQUE DE PARIS

44, rue de Rennes.

VERKOJ EN FRANCA LINGVO.

BIBLIOGRAPHIE GÉNÉRALE.

Manuel du Répertoire bibliographique universel. Publication n° 63 de l'Institut international de Bibliographie, 1, rue du Musée, Bruxelles. Un fort volume relié de plus de 2200 pages, comprenant l'exposé de l'organisation des travaux et des méthodes de l'Institut, ainsi que les tables de classification décimale universelle, (Tables principales et tables des divisions communes) qui renferment plus de 33000 divisions méthodiques, avec index alphabétique de plus de 40000 mots classificateurs. Prix : 50 fr. (port en sus).

(L'Ouvrage est formé par la réunion de 35 fascicules qui peuvent être vendus séparément. Demander le Catalogue détaillé).

Manuel pour l'usage du Répertoire bibliographique de la Photographie
Publication n° 45..... Prix : 1 fr. 50.

Manuel pour la formation et l'usage du Répertoire bibliographique universel de Locomotion et des Sports (tourisme, cyclisme et automobilisme), établi d'après la classification bibliographique décimale. Publication n° 48..... Prix : 1 fr. 50.

Manuel pour l'usage du Répertoire bibliographique des Sciences physiques établi d'après la classification décimale. Publication n° 26.... Prix : 1 fr. 50.

Instruction sur le dépouillement des publications périodiques (françaises) avec supplément pour les publications étrangères et l'application de la langue internationale auxiliaire Esperanto..... Prix : 1 fr. 50.

BIBLIOGRAPHIE SPÉCIALE DE L'ESPERANTO.

Bibliographie de l'Esperanto et classification décimale universelle (édition française)..... Prix : 0 fr. 50.

Manuel du Répertoire bibliographique universel. Extraits limités aux parties spécialement applicables à la bibliographie de la langue auxiliaire internationale Esperanto, avec appendice sur l'emploi de cette langue en bibliographie (fascicule supplémentaire du Manuel)..... Prix : 1 fr. 50.

Emploi en bibliographie de la langue auxiliaire Esperanto. Tirage à part de l'Appendice ci-dessus Prix : 0 fr. 25.

OFICIALA GAZETO ESPERANTISTA

ORGANO DE LA LINGVA KOMITATO

KAJ DE LA

KONSTANTA KOMITATO DE LA KONGRESOJ.

*Aperas ĉiumonate, escepte en septembro***Prezo :**Jara abono : 5 frankoj.
Unu numero : 50 centimoj.**Redakcio kaj Administracio :**

51, rue de Clichy, Parizo.

Anoncoj :Sola agento : G. WARNIER.
15, rue Montmartre, Parizo.

OFICIALA PARTO.

MALFERMA PAROLADO DE DOKTORO ZAMENHOF EN LA KVINA KONGRESO.

Karaj samideanoj kaj amikoj! Ĉiufoje kiam komenciĝas nova interkongresa jaro, ĉiu esperantisto, kiu antaŭvidas por si iom da libera tempo kaj povas ŝpari iom da mono, komencas prepariĝadi al la estonta kongreso esperantista, al la plej proksima granda komuna festo de la popolo esperantista. Amikoj, kiujn ligas la sama ideo, la samaj aspiroj kaj espero, kortuŝite diris al si reciproke « ĝis la revido », kaj kun ĝojo ili atendas tiun revidon. Kiel reciproke sin amantaj gefratoj, kiuj nur de tempo al tempo povas kuniĝi en la domo de siaj gepatroj, tiel la esperantistoj sopire atendas tiun momenton, kiam ili povos renkontiĝi en la centro de Esperantujo, ame saluti sin reciproke, varme premi al si la manojn kaj diri al si : « ni vivas, ni honeste laboris en la daŭro de la jaro, ni gardis honeste la honoron de nia domo, ni povas kun pura konscienco partopreni en la komuna festo de nia familio. »

Sed dum ĉiu el vi prepariĝas al nia komuna festo kun koro tute ĝoja, mi faras tion saman ĉiam kun koro iom peza, ĉar en niaj kongresoj la sorto donis al mi rolon kvankam tre flatan, tamem samtempe

ankaŭ tre ŝarĝan : mi estas devigata akceptadi honorojn, kiuj apartenas ne al mi. Prave aŭ malprave la mondo vidas en mi ĉiam la naturan reprezentanton de la anaro esperantista, la simbolon de la esperantismo, de la esperantista lojaleco kaj unueco ; kaj ĉar la homoj ne povas esprimi siajn sentojn al io abstrakta, tial ĉiuj esprimoj de simpatio kaj entuziasmo por la esperantismo direktiĝas sub mia adreso.

Ekzistas tamen personoj, kiuj tion ne komprenas aŭ ne volas kompreni ; ili envas la flagon pro la honoroj, kiuj estas farataj al ĝi ; ili vidas en mi personon, kiu kvazaŭ ludas la rolon de ia reĝo. Jen estas la kaŭzo, pro kiu mi ĉiam kun peza koro veturas al niaj kongresoj. Forte, tre forte mi dezirus forrifuzi mian por mi tro turmentan rolon, kaj stari ne antaŭ vi, sed inter vi ; sed la afero ne dependas de mia volo, ĝi dependas de diversaj cirkonstancoj, antaŭ kiuj mi devas min klini, se mi ne volas malutili al nia movado. Tial ankaŭ hodiaŭ mi staras antaŭ vi kiel simbolo de via afero kaj de via unueco, kiel via konkreta reprezentanto ; mi akceptas ĉion, kio estas destinata por vi, kaj mi ĉion fidele transdonas al vi, popolo esperantista.

En ĉi tiu mia rolo de via reprezentanto, mi antaŭ ĉio atentigas vin pri la granda honoro, kiun faris al ni lia reĝa moŝto la reĝo Alfonso Dektria, afable akceptinte la honoran prezidantecon de nia kongreso. Mi esprimas en via nomo nian plej respektan dankon al lia reĝa moŝto. La reĝo Alfonso XIII longe vivu !

Mi atentigas vin pri la granda simpatio, kiun montris al nia afero la registoj de tiu lando, en kiu ni nun troviĝas ; ne sole ĉiuj ministroj prenis sur sin la patronecon de nia kongreso, sed la registaro de la lando en sia propra nomo per siaj ambasadoroj oficiale invitis la registarojn de aliaj landoj, ke ili sendu delegitojn al nia kongreso. Por ĉi tiu granda kaj tre grava servo mi esprimas en via nomo plej varman dankon al la registaro de la hispana regno.

Vi scias, kiel energie kaj zorge la loka organiza komitato laboris por belega kaj plej fruktoporta preparado de nia nuna kongreso. Vi scias ke ili ne perdis la kuraĝon, eĉ malgraŭ la malfeliĉaj Barcelonaj okazintaĵoj, kiuj ĉiun el ni devigis pensi, ke la kongreso en Barcelono estas jam absolute nefarebla. Parton de tio, kion la komitato faris, vi jam vidis, la ceteran parton vi vidos dum la kongreso mem kaj en la postkongresaj tagoj. Al ĉi tiu multe laborinta komitato, kaj precipe al ĝia kara prezidanto, mi esprimas en la nomo de ni ĉiuj nian plej koran dankon.

Vi vidis, kian eksterordinare honoran kaj simpatiplenan akcepton

preparis por ni la urbo Barcelono. Vi scias, ke nur apartaj, neantaŭviditaj cirkonstancoj malhelpis la urbon, montri kun plena entuziasmo kaj en sia plena amplekso sian grandan estimon, sian plej vivan simpatian al vi, popolo esperantista, al via penado kaj laborado, al via celo kaj esperoj. En via nomo mi esprimas al la urbo nian plej profundan kaj sinceran dankon.

En la ĝisnunaj kongresoj mi havis ion por diri al vi, tial ĉe la malfermo de la kongreso mi parolis longe; hodiaŭ mi havas nenion gravan por diri, tial mi parolos mallonge. Vi scias, kia estas nia celo; vi scias, kia estas la sola vojo, per kiu ni povas atingi tiun celon; ni marŝu do antaŭen diligente kaj harmonie. Se ni demandos nin, kion ni faris, en la ĵus finiĝinta interkongresa jaro, ni povos respondi: « Ni same vivis, ni kreskis, ni fortiĝis en ĉiuj rilatoj. » Kian grandan signifon tio havas, tion povas kompreni nur tiuj, kiuj komprenas la tutan gravecon kaj malfacilecon de nia afero, kaj kiuj mem laboris por ĝi. Kiel en la jaroj pasintaj, tiel [ankaŭ en la jaro ĵus finiĝinta, multaj el vi laboris por nia komuna afero kun granda fervoro kaj sindoneco; al ili la Esperantistaro esprimas sian koran dankon. Sed dum la Kongreso, ni ne sole rakontos al ni reciproke pri la laboroj faritaj, ni devos plenumi ankaŭ kelkajn laborojn komunajn, kiuj postulas komunan interkonsiliĝon kaj interkonsenton.

Ni komencu en feliĉa horo niajn kongresajn laborojn kaj festojn, al la unuaj ni penu doni la plej bonan sukceson, en la duaj ni ĉerpu kuraĝon kaj forton por la laboroj de la jaro venonta.

L. L. ZAMENHOF.

LINGVA KOMITATO.

Protokoloj de la kunsidoj de la Lingva Komitato, dum la Kvina Kongreso.

Unua Kunsido (7 septembro 1909).

La kunsido komenciĝas je la 9^h30^m, matene, en la Universitato.

Ĉeestas ⁽¹⁾: D^{ro} ZAMENHOF; S^{ro} BOIRAC, Prezidanto (DOMBROWSKI, EBNER, LALLEMANT, MORIN, MÉRAY, MATTON); D^{ro} MYBS, Vicprezidanto (ELB, LADEVÈZE); S^{roj} CART, (NYLEN, LENGYEL, SCHAFER, MERKENS, BOULET, BEIN); GRABOWSKI (NAUMANN); DE SAUSSURE (MEAZZINI, MUSCHAMPS, SCHMID, WENGER), Direktojoj de komisioj; kaj S^{roj} AYMONIER; BAKER; BICKNELL; VAN DER BIEST (VAN MELCKEBECKE); BOBIN; BOUCON; BOURLET (UITTERDYCK, GROSJEAN-MAUPIN, LEONO ZAMENHOF); BREMON Y MASGRAU; BUTLER; CHAVET (BLANGARIN, HANAUER); CHRISTALLER; CORRET (PARISOT); DOR; ELLIS; EVROT; HANKEL (VELTEN); HOVELER (COSTA E ALMEIDA); INGLADA; KEATING; KUHN (PROCHARSKA); JONES; MANN; MEYER; MOSCHELES; MILLIDGE (COX, LOWELL, PADFIELD); MUDIE (BUSUTILL, POLLEN); NOEL; PEROGORDO (CODORNIU); PRIVAT; RHODES; RICHARDSON; ROLLET DE L'ISLE (VERAX); RUST; SABADELL (BENAVENTE, CAPÉ); SEBERT (VARGAS); WACKRILL; anoj de la Lingva Komitato.

Rektoro BOIRAC, prezidanto de la Lingva Komitato kaj de la Akademio, prezidas. Apudsidas D^{ro} Zamenhof.

S^{ro} BOIRAC salutas la Lingvokomitatanojn kaj aparte la novajn membrojn, elektitajn dum la pasinta jaro, kiuj la unuan fojon partoprenas en kunsido de la komitato. La unua tasko, li diras, estas starigi nomaron de la ĉeestantaj komitatanoj kaj kontroli la rajtigojn.

⁽¹⁾ Post la nomo de ĉiu ĉeestinto, oni presis, inter krampoj, la nomojn de la forestantaj Lingvokomitatanoj, kiujn li akceptis reprezenti.

S^{ro} CHAVET legas liston de tiuj el la komitatanoj, kiuj respondis la cirkulerojn 20 kaj 20 *bis* kun la nomoj de la reprezentatoj, kaj notas, kiuj ĉeestas en la ĉambro de l'kunsido.

El la 156 komitatanoj, 71 ĉeestas aŭ estas regule reprezentataj. Tiu ĉi nombro ne estas sufiĉa, se oni volus fari ian decidon; sed en tiu ĉi kunsido oni nur preparolos la tagordon de la venontaj kunsidoj. Cetere alvenas pluaj komitatanoj, reprezentantaj ankaŭ kelkajn kolegojn.

Oni elektas S^{ron} CORRET kiel sekretarion de la kunsidoj, kaj poste la Prezidanto sciigas, ke la venonta kunsido okazos la morgaŭan tagon je la naŭa matene.

* * *

En tiu kunsido S^{ro} BOIRAC raportos pri la laboroj de la Lingva Komitato kaj de la Akademio dum la pasinta jaro.

Oni devos ankaŭ konsideri la demandon, ĉu estas necese pliiĝi la nombron de la Akademianoj, — kaj en tiu ĉi okazo, ĉu oni tuj atingos la maksimumon difinitan de la regularo, elektante ses novajn membrojn, aŭ nur elektos, ekzemple, tri pluajn Akademianojn, lasante ankoraŭ tri liberajn lokojn. El Ameriko oni insistas, por ke la Amerikanoj havu reprezentanton en la Akademio.

Alia esplorota demando estas la maniero de elekto de novaj Lingvokomitatoj, kaj aparte ĉu oni ne devus organizi antaŭan enketon, por sciigi, ĉu ili estas elektindaj?

S^{ro} BOIRAC poste demandas, ĉu oni proponas aliajn esplorotajn demandojn.

S^{ro} DE SAUSSURE proponas, ke oni faru deklaron pri la labormaniero de la Akademio.

S^{ro} BOIRAC diras, ke kelkaj personoj tre ŝatas deklarojn, sed aliaj, ekzemple D^{ro} BEIN, ilin tute ne ŝatas, kaj opinias, ke oni ne devas ilin tromultiĝi. Ĉu ne sufiĉos la raporto, kiun li morgaŭ faros pri la laboroj de la Akademio?

* * *

S^{ro} BOIRAC poste proponas enmeti la jenan demandon en la tagordon: kelkaj kolegoj restas membroj de la Lingva Komitato kaj samtempe apartenas al alia anaro, kies celo estas detru ian lingvon kaj ĝin anstataŭigi per tute alia lingvo. Li skribis leteron al unu el ili.

S-ro CHAVET legas la respondon de tiu kolego, kiu en ĝi penas pravigi sian konduton kaj sciigas, ke li ne intencas ekŝiĝi el la Lingva Komitato. Aliparte aperis en kontraŭ-esperanta gazeto artikolo de alia komitatano, titolita « Kiel nomi nian lingvon? » Ĉar Esperanto tute ne bezonas, ke oni serĉu por ĝi nomon, evidente estas, ke tiu kolego ne plu estas esperantisto. Ĉu oni povas fari ion pri tio?

Pastro RICHARDSON rimarkigas, ke alia Lingvokomitato estas ĉefredaktoro de nun kontraŭ-esperanta gazeto.

D^{ro} DOR proponas tujan forstrekon de unu el tiuj kolegoj.

S^{ro} BOIRAC atentigas, ke pri tio ekzistas neniu regulo en la regularo de la Lingva Komitato. Oni ne devas efektiviĝi tian forstrekon *ab irato*, sed esplori, kion oni devas fari en tiaj cirkonstancoj.

La kunsidantoj akceptas enmeton de tiu ĉi propono en la tagordon.

La kunsido finiĝas je la deka.

Dua Kunsido (8 septembro 1909).

La dua kunsido komenciĝas, je la 9^a horo en la Universitato.

Ĉeestas : S^{ro} BOIRAC, Prezidanto (MORIN, MÉRAY, MATTON, DOMBROWSKY, EBNER, LALLEMANT); D^{ro} MYBS, Vicprezidanto (ELB, LADEVÈZE); S^{roj} CART (NYLEN, LENGYEL, SCHAFFER, MERKENS, BOULET, BEIN); GRABOWSKI (NAUMANN); DE SAUSSURE (MEAZZINI, MUSCHAMP, SCHMID, WENGER), Direktoroj de komisioj, kaj S^{roj} ARTIGUES; AYMONIER; BAKER; BICKNELL; VAN DER BIEST (VAN MELECKEBECKE); BOUCON; BRICARD; BUTLER; CHRISTALLER; CORRET (PARISOT), ELLIS; EVROT; HANKEL (VELTEN); HOVELER (COSTA E ALMEIDA); INGLADA; JONES; MANN; MEYER; MILLIDGE (COX, PADFIELD, LOWELL); MUDIE (BUSUTILL, POLLEN); NOEL; PRIVAT; KUHN; RHODES; ROLLET DE L'ISLE (VERAX); RUST; SABADELL (BENAVENTE, CAPÉ); SEBERT (VARGAS); WACKRILL; WARDEN, anoj de la komitato.

Rektoro BOIRAC prezidas. Apudsidas D^{ro} Zamenhof.

S^o BOIRAC anoncas ke la Direktoroj tuj raportos pri la laboroj efektigitaj en la diversaj sekcioj.

Li poste sciigas, kion li intencas raporti mem. Oni ofte aŭdas plendojn, ke la Akademio kaj la Lingva Komitato nenion faras. La raportoj de la Direktoroj montros, kion oni faris en la specialaj sekcioj. Sed estis ankaŭ alia grava laboro, kiu okupis la Akademion dum la jaro.

La Dresdena Kongreso faris deklaron, per kiu ĝi difinis la rolon de la Lingva Komitato, nome: «Zorgi pri la konservado de la fundamentaj principoj de la lingvo kaj kontroli ĝian evolucion.» Sed oni povas sin demandi, ĉu tiu aŭ alia punkto estas konforma al la Fundamento, aŭ ne. Aliparte, oni ofte diras, ke la Lingva Komitato ĉiam rifuzas proponojn, dirante, ke ili estas kontraŭaj al la Fundamento, dum, kontraŭe, la proponantoj opinias, ke ili estas tute konformaj al ĝi. Por respondi tion, Rektoro BOIRAC decidis, konsente kun D^{ro} ZAMENHOF, remeti la tutan lingvon sur la tablon kaj esplorigi de la Akademianoj, ĉu tiu aŭ alia punkto povas kaj devas esti ŝanĝita; kaj, se oni decidis, ke oni nenion ŝanĝos, tiam la afero estos finita por ĉiam.

En unua cirkulero, S^o BOIRAC demandis pri ĉiuj punktoj de la lingvo, kaj responde tiun cirkuleron oni forigis ĉiujn proponojn, kiuj tute ŝanĝus la lingvon. Restis ekzamenotaj aliaj malpli gravaj punktoj. S^o BOIRAC faris duan novan liston, kiun li proponis al la ekzameno de la Akademianoj. Ĝi enhavis, ekzemple, aprobon de novaj sufiksoj, jam parte uzitaj en la scienca lingvo. La plimulto de la Akademianoj responde esprimis la opinion, ke ne estus bone konsili la uzadon de tiuj sufiksoj en la komuna lingvo.

novaj su
malakcept

El la proponoj prezentitaj al la Akademio, restis nur la du sekvantaj:

1^o Ke oni donu ĝeneralajn konsilojn pri la elektado de novaj radikoj;

2^o Ke oni klarigu kaj precizigu la nunan derivadon, kondiĉe ke la konsilo ne estu en formo de rigida regulo.

Nun do se iam estonte oni denove prezentos proponojn el la jam esploritaj kaj malakceptitaj, respondo nur estos, ke la demando estis jam studita kaj solvita per malakcepto. Oni do ne bezonos perdi tempon per nova esploro de tiuj demandoj kaj povos sin dediĉi al aliaj studoj, kaj aparte al studado de la du supre cititaj akceptitaj proponoj.

La Komitato unuanime aprobas la ĝeneralan sencon de la raporto de S^o Boirac.



S^{ro} CART, Direktoro de la sekcio por la komuna vortaro, poste raportas pri la laboroj de tiu ĉi sekcio.

Li klarigas, kiamaniere estis elektitaj la 800 novaj vortoj. Oni uzis por tio la bonegajn laborojn de S^{roj} WACKRILL kaj Paul BOULET. Ĉiu kunlaboranto forstrekis la radikojn, kiuj ŝajnis al li ne ankoraŭ oficialigindaj, kaj oni definitive akceptis nur tiujn, pri kiuj konsentis almenaŭ 9 akademianoj. Tio signifas, ke ili estis do ĉiuj preskaŭ unuanime akceptitaj. Multon oni ne akceptis, ĉu pro tio ke la radikoj ŝajnis ne taŭgaj por la derivado, ĉu [aliparte] ĉar oni trovis ilin malbonaj en si mem.

Granda korespondado estis necesa precipe por precizigi la tradukojn. Okazis ja ofte, ke samlingvaj Akademianoj ne tute interkonsentis pri tradukoj en ilia lingvo, kaj estis necese inter ili fari akordon. Tiel montriĝis, ke la plej granda malfacilaĵo estas en la kvinlingva traduko de la radikoj. Povas esti, ke kelkaj tradukoj ne ankoraŭ estas tute bonaj. Pri la neĝustaj tradukoj oni nur bonvole sciigu la Akademion; la kritikojn oni zorge ekzamenos kaj utiligos por korekto de efektivaj eraroj.

Oni ne riproĉu, ke oni ne eldonis plenajn seriojn. Ĉar oni elektis nur vortojn jam uzitajn de D^{ro} ZAMENHOF mem, povas esti, ke tiu aŭ alia vorto mankas en iu serio. Sed tio tute ne signifas, ke ĝi estas malakceptita. Oni tute prave povos uzadi tiujn mankantajn vortojn, kiuj poste estos oficialigitaj; kaj post 2 aŭ 3 jaroj ni havos plenajn seriojn. Por tio estos bonega materialo tiaj verkoj, kiel la ĵus aperinta vortaro de S^{ro} BOIRAC kaj tiu anoncita de D^{ro} BEIN.

La vortojn finiĝantajn per *ino*, *ero*, k. t. p. oni akceptis senŝanĝe. Tion oni kritikis; sed estas tute senutile kripligi la finiĝojn de tiaj vortoj por eviti konfuzojn teorie eblajn, sed neniam efektiviĝantajn. Pli granda malbono kaj maloportuneco nur povus rezulti el ilia kripligo. Kial do ne kripligi ankaŭ la vortojn, kiuj finiĝas per *ulo*, *ano*, k. t. p. kiel ekzemple *betulo* aŭ *romano*?

La kritikoj kiuj oni faras pri la Aldono estas la samaj, kiujn oni faras pri la Fundamento mem, kaj estas nek justaj, nek ĝustaj.

D^{ro} ZAMENHOF ne celis fari lingvon teorie perfektan de logika vidpunkto. Tiaj efektive ne estas homaj lingvoj; sed li sukcesis fari vere homan lingvon. Ni ĝin respektu tiel same egale, kiel niajn proprajn naciajn lingvojn!

i la
dono
U. V.

* *

S^{ro} de SAUSSURE, Direktoro de la sekcio por la teknika vortaro diras, ke post du jaroj da laboro pri scienca vortaro, li alvenis al tute sama konkludo kiel S^o CART pri komuna vortaro. Pri tio li tre ĝojas, ĉar estus tre malbone, se oni havus du malsamajn metodojn por scienca kaj por komuna lingvo. Ekzistas du sekcioj por la laborado pri teknikaj vortoj : la Akademia sekcio kaj la sekcio de la Scienca Asocio. La unua kolektas vortojn tute same kiel faris S^o CART, kaj pri ĝi ankaŭ oni ne devos miri, se ĝi ne tuj eldonos plenajn seriojn. Pri nomoj de simplaj korpoj, ekzemple, aperos unue nur tiuj, pri kiuj estas ĝenerala konsento. La aliaj ankoraŭ atendas ĉe la pordo. La sekcio de la Scienca Asocio sin okupas per kolektado de proponataj sciencaj vortoj kaj donas konsilojn kaj regulojn al la specialistoj, kiuj deziras labori pri la teknika vortaro.

* *

S^o GRABOWSKI, Direktoro de la gramatika sekcio, raportas pri la laboroj de tiu sekcio. Li donadis respondojn al la cirkuleroj de la prezidanto, trarigardis la novajn vortojn kolektitajn de S^{ro} CART, respondadis al diversaj proponoj kaj klarigadis diversajn gramatikajn demandojn, senditajn al la Akademio. Kiam la respondoj prezentis nenian dubon, S^o GRABOWSKI respondis ilin mem; en aliaj okazoj, post konsulto kun D^{ro} ZAMENHOF kaj la akademianoj.

Invitite de S^o GRABOWSKI, pli granda rondo da diversnaciaj lingvokomitatoj komencis studadi laŭ konstata scienca metodo diversajn gramatikajn kaj sintaksajn demandojn. Tiuj monografioj servos poste kiel bazo por plena sintakso esperanta, fondota sur la verkoj de modelaj aŭtoroj. Ĉirkaŭ dudek tiaj monografioj estas en prilaborado kaj kelkaj jam alvenis al la gramatika sekcio. Kiam ili kolektiĝos en pli granda nombro, ili estos trarigarditaj de speciala kritika komisio kaj presitaj en la Oficiala Gazeto.

La reĝa Instituto de Esperanto en Dresden petis la Esperantan Akademion, ke ĝi ellaboru normalan gramatikon, ĉar ekzistas duboj pri kelkaj gramatikaj demandoj aŭ esprimmanieroj.

Kvankam la gramatiko de lingvo vivanta ne povas antaŭvidi kaj respondi ĉiujn demandojn, kaj solvi tion, kion la vivo ankoraŭ ne solvis, la gramatika Sekcio intencas plenumi la deziron de la Dresdena Instituto, kiam la afero estos sufiĉe preparita per la monografioj. Tia

labormetodo postulos sufiĉe longan tempon, sed la gramatika sekcio ne povas rapidi, memorante sian gravan respondecon antaŭ la Esperantistaro.

. . .

La raportoj de S^{oj} CART, de SAUSSURE kaj GRABOWSKI estas unuanime aprobataj; oni decidas ke S^o BOIRAC ilin utiligos por sia ĝenerala raporto kaj la kunsido finiĝas je la 10^a.

Tria kunsido (9 septembro 1909).

La tria kunsido komenciĝas je la 9^a horo matene, en la Universitato.

Ĉeestas : D^{ro} ZAMENHOF; S^{ro} BOIRAC Prezidanto, (MORIN, MÉRAY, MATTON, DOMBROWSKI, EBNER, LALLEMANT); S^{ro} D^{ro} MYBS (ELB, LADEVÈZE), Vicprezidanto; S^{roj} CART (NYLEL, LENGYEL, SCHAFER, MERKENS, BOULET, BEIN); GRABOWSKI (NAUMANN); DE SAUSSURE (MEAZZINI, MUSCHAMP, SCHMID, WENGER); Direktoroj de komisioj, kaj S^{roj} ARTIGUES; AYMONIER; BAKER; BICKNELL; VAN DER BIEST (VAN MELCKEBECKE); BOBIN; BUTLER; CHAVET (BLANGARIN, HANAUER); CHRISTALLER; CORRET (PARISOT); DOR; HANKEL (VELTEN); HOVELER (COSTA E ALMEIDA); INGLADA; KEATING; JONES; MANN; MEYER; MOSCHELES; MILLIDGE (COX, PADFIELD, LOWELL); MUDIE (BUSUTILL, POLLEN); NOEL; PEROGORDO (CODORNIU); PRIVAT; RHODES; PUJULA; RICHARDSON; ROLLET DE L'ISLE (VERAX); RUST; SABADELL (BENEVENTE, CAPÉ); SEBERT (VARGAS); WACKRILL; WARDEN; anoj de la Komitato.

Rektoro BOIRAC prezidas. Apudsidas D^{ro} ZAMENHOF.

La sekretario legas la protokolojn de la du antaŭaj kunsidoj. Post kelkaj ŝanĝoj kaj aldonoj, la Komitato unuanime ilin akceptas.

. . .

S^{ro} BOIRAC diras, ke la demando hodiaŭ estas pri eventuala pliigo de la nombro de la Akademianoj, sed, kompreneble, oni nur povos fari principajn decidojn, kaj poste oni devos efektiviĝi voĉdonon per korespondo.

S^o CHAVET diras, ke el letero de S^o BOURLET ricevita kiel repondo al unu cirkulero, li povas konigi la opinion de tiu neĉeestanta

Komitatano : S^o BOURLET opinias, ke ne devas esti fiksa la nombro de la Akademianoj kaj oni ne devas elekti Akademianojn por atingi tiun aŭ alian nombron, sed nur kiam montriĝos iu akademiinda.

S^o MUDIE demandas, ĉu ĉiuj Akademianoj tre diligente laboras ?

S^o BOIRAC respondas, ke li ne volas morale taksu la laboremecon de la Akademianoj, sed materiale li povas diri, ke kelkaj Akademianoj ne respondas la leterojn al ili adresitajn, aŭ ilin nur malfrue respondas, ofte nur post dua alsendo de sama letero. Tiuj kolegoj precipe apartenas al landoj malproksimaj. Sendube la leteroj kelkafoje perdiĝas ĉe la poŝto. Tiuj kolegoj ja ofte sciigas, respondante la duan leteron, ke ili ne ricevis la unuan.

S^o CHAVET rimarkigas, ke oni ne devas elekti Akademianojn laŭ landoj, sed laŭ lingvoj.

S^o CART same opinias, kaj deziras, ke la diversaj lingvoj estu reprezentataj.

S^o AYMONIER diras, ke Esperanto estas lingvo; — do, laŭ la lingvoj oni devas elekti.

S-ro MUDIE proponas, ke oni eksigu la ne laborantajn Akademianojn. La ofico de Akademiano ne devas nur esti honora ofico, sed labora ofico.

S^o de SAUSSURE rememorigas, ke la nuna demando estas : ĉu oni devas elekti novajn Akademianojn. Lia opinio estas, ke tion oni ne urĝe bezonas. Tamen la angla lingvo povus havi trian reprezentanton. Tiu reprezentanto povus esti Amerikano, ne ĉar la lando Ameriko devus esti reprezentata, sed pro praktikaj kaŭzoj.

S-ro BOIRAC diras, ke pro insista petado de la Amerikanoj, li enmetis en la tagordon la demandon pri pliigo de la nombro de la Akademianoj.

S^o AYMONIER rimarkigas, ke estas des pli necese elekti Amerikanon, ĉar la venonta Kongreso estos en Ameriko.

S^o BAKER diras, ke ekzistas kvar amerikaj Lingvokomitatoj, sed tri el ili ne estas esperantistoj. La Amerikanoj dezirus voĉdoni mem pri la elektota Akademiano. Ili ja kvazaŭ adoras reprezentadon.

Donu al ili liberecon, ili tuj ĝis transdonos en manojn de reprezentantoj.

S^o BOIRAC rimarkigas, ke la elekto de Akademianoj estas laŭ du ŝtupoj. Akademiano unue devas esti Lingvokomitato; poste li povas fariĝi Akademiano. La unua afero estas do elekti novajn Lingvokomitatojn el Ameriko.

S-ro CHAVET legas la nomojn de la nove elektitaj Lingvokomitatoj el Ameriko, inter kiuj oni povus elekti Akademianon. Li demandas kial la Amerikanoj ne sendis pli grandan liston da kandidatoj.

S^o GRABOWSKI demandas ĉu la kandidatoj estis proponitaj de apartaj personoj aŭ de Societoj.

S^o CHAVET respondas, ke unu el la proponoj estis farita de S^o TWOMBLY kaj la alia de la Amerika Asocio.

S^o BOIRAC diras, ke nun ne estas sufiĉe da Amerikaj Lingvokomitatoj por elekti el ili Akademianon.

S^o CHAVET sciigas, ke oni sendis novajn nomojn de kandidatoj el Ameriko.

S^o BOIRAC opinias, ke estus necese havi sciigojn pri la proponataj kandidatoj.

S^o MUDIE bedaŭras, ke ne ĉeestas la kunsidon pli da Amerikanoj. Li parolis multe kun Amerikanoj. Li proponas, ke oni elektu Amerikanon kiel Akademianon, kaj ke tiu Amerikano estu D^{ro} LOWELL. Se li ne akceptus, tiam li proponus S^{on} BAKER.

S^o BAKER diras, ke D^{ro} LOWELL estas tute kompetenta kaj elektinda, sed li estas tre okupita kaj sendube ne akceptos.

S^o MUDIE diras, ke lia elekto montrus, ke li havas la konfidon de la Amerikanoj, kaj poste li povus eble akcepti.

S^o PRIVAT, dum sia restado en Ameriko, konstatis grandan konfidon al S^o LOWELL, kiu cetere parolas tre bone la lingvon. Li aprobas la proponon de la elekto.

S^o CART rimarkigas, ke nun estas unue principa demando : ĉu oni pliigos la nombron de la Akademianoj.

S^o de SAUSSURE proponas voĉdonigi ke :

- 1^o En la nuna stato ni ne bezonas tujan pliigon;
- 2^o En la daŭro de la jaro oni elektu amerikanon.

S^o BOIRAC voĉdonigas pri tiu ĉi propono. La plimulto de la ĉeestantaj komitatanoj ĝin akceptas.

S-ro AYMONIER diras, ke la nova amerika Akademiano devas esti elektita antaŭ la venonta Kongreso.

S^o BOIRAC rimarkigas, ke oni devos fari la elekton de la nova Akademiano, nur post kiam estos elektitaj novaj membroj de la Lingva Komitato.

Daŭrigon de la diskutado, oni prokrastas ĝis la venonta kunsido.

La kunsido finiĝas je le 10^a.

Kvara Kunsido (septembro 1909).

La kunsido komenciĝas je la 9^a horo en la Universitato.

Ĉeestas : S^{ro} BOIRAC, Prezidanto (MORIN, MÉRAY, MATTON, DOMBROWSKY, EBNER, LALLEMANT); S^{roj} CART (NYLEN, LENGYEL, SCHAFER, MERKENS, BOULET, BEIN); GRABOWSKI (NAUMANN); DE SAUSSURE (MEAZZINI, MUSCHAMP, SCHMID, WENGER), Direktojoj de komisioj; kaj S^{roj} ARTIGUES; AYMONIER; BICKNELL; VAN DER BIEST (VAN MELCKEBECKE); BOBIN; BOUCON; BREMON Y MASGRAU, BUTLER; CHAVET (BLANGARIN, HANAUER); CHRISTALLER; CORRET (PARISOT); DOB; HANKEL (VELTEN); HOVELER (COSTA E ALMEIDA); INGLADA; KEATING; KUHN; JONES; MANN; MEYER; MILLIDGE (COX, PADFIEL, LOWELL); MUDIE (BUSUTILL, POLLEN); PEROGORDO (CODORNIU); PRIVAT; RHODES; RICHARDSON; RUST; SABADELL (BENAVENTE, CAPÉ); SEBERT (VARGAS); WACKRILL; WARDEN, anoj de la Lingva Komitato.

Rektoro BOIRAC prezidas; apudsidas D-ro ZAMENHOF.

S-ro BOIRAC demandas, ĉu iu deziras ankoraŭ paroli pri la pliigo de l'nombro de la Akademianoj.

S-ro CART diras, ke estus tre malfacile fari nun decidon, oni preferu lasu al la Akademio kaj al la Lingva Komitato la eblecon elekti kelkajn membrojn dum la venonta jaro.

S-ro BOIRAC sciigas, ke oni proponis elekti novan Akademianon ankaŭ el Sud-Ameriko. Tio ĉi estus des pli bona, ĉar povus esti utile havi en la Akademio pluan reprezentanton de la hispana lingvo.

S-ro INGLADA miras, ĉar oni parolas pri nova Akademiano el Sud-Ameriko. Ĉu oni ne jam diris, ke la elektoj devas esti faritaj ne laŭ landoj, sed laŭ lingvoj?

S-ro BOIRAC respondas, ke el Sud-Ameriko povus esti reprezentanto de la portugala lingvo, kiu estas ankaŭ tre grava.

S-ro MUDIE denove insistas, ke oni ne konservu en la Akademio efektive ne laborantajn membrojn.

S-ro CART dedove proponas, ke la Lingva Komitato lasu al la Akademio la liberecon (se ĝi opinias tion ĉi necesa), proponi al la Lingva Komitato la elekton de du aŭ tri pluaj Akademianoj dum la venonta jaro, tiamaniere ke la nombro de la Akademianoj povus atingi sume 15, kune kun la nova Amerika membro, kiun oni jam decidis elekti.

S-ro BOIRAC voĉdonigas pri tiu ĉi propono; ĝi estas unuanime akceptata.

S-ro MUDIE demandas, ĉu oni proponos por la elekto nur tri nomojn?

S-ro BOIRAC respondas, ke laŭ la regularo la nombro de la proponataj kandidatoj devas esti proksimume la duoblo de la nombro de la elektotaj Akademianoj. Por elekti tri Akademianojn, oni do proponus almenaŭ ses nomojn. Cetere oni ĉiam povas sendi al la Akademio proponojn pri kandidatoj, kiuj ŝajnas elektindaj.

* *

Alia demando estas pri interna regularo por la Akademio kaj por la Lingva Komitato. Se ĝi ekzistus, ĝi enhavus paragrafon pri ekziĝoj, same kiel ĉiuj societaj regularoj antaŭvidas ekziĝojn ĉu propramovajn, ĉu devigitajn. Tia regularo ĝis nun ne ekzistas. Ĉu oni devas ĝin starigi?

S-ro CART diras, ke oni jam forstrekis ne laborantajn membrojn el la Lingva Komitato. Oni do povas forstreki.

S-ro BOIRAC respondas, ke tiujn forstrekojn oni efektivigis laŭ la regularo, ĉar post certa tempo ili ne respondis demandojn al ili adresitajn. Por starigi internan regularon, ekzistas du metodoj : ĉu tiuj studi la demandon, ĉu komisii kelkajn Akademianojn, por prepari projekton, kiun oni poste esploros.

S-ro MUDIE preferas la unuan metodon.

S-ro BOIRAC rimarkigas, ke oni povus ankaŭ kunigi ambaŭ metodojn, interŝanĝante nun ideojn kaj farante proponojn, kiujn oni povus utiligi poste por starigo de regularo.

S-ro CART revenas al la demando, kion oni devas fari kontraŭ la membroj de la Lingva Komitato, kiuj nun laboras kontraŭ Esperanto kaj ne ekzigis propramove ?

S-ro BOIRAC atentigas, ke la afero efektive estas multe pli malsimpla ol ĝi ŝajnas. Ekzistas du kaŭzoj por eksigo : nelaboro kaj perfido.

S-ro BOURLET opinias, ke la Komitato nun ne havas sufiĉan tempon, por plene solvi la demandon. Oni povus nur principe decidi, ke la Prezidanto de la Lingva Komitato preparos ŝanĝojn en la regularo, tiamaniere ke oni povu forstreki tiujn, kiuj ne sufiĉe laboras aŭ ĉesis efektive propagandi la lingvon de D-ro Zamenhof.

S-ro BOIRAC rimarkigas, ke tio ĉi estas la dua metodo, sed ke S-ro MUDIE preferas la unuan, dum li mem proponis kunigi ambaŭ metodojn; la Komitato ja nun havas tempon proponi kelkajn ideojn, kiujn oni povos utiligi poste. Pri la ne-laborantoj ekzistas jam regulo en la regularo de la Lingva Komitato. Ĝi estas la kvara paragrafo, jene redaktita : « Estos rigardataj kiel ekzigintaj la anoj, kiuj restis pli ol ses monatoj, ne respondante la leterojn al ili adresitajn. » Sed ĉar eksigo estas kvazaŭ puno, devas esti juĝo, antaŭ ol ĝin efektiviĝi.

S-ro CORRET diras, ke oni eble povus simple aldoni al la kvara paragrafo de l'regularo la vortojn : « ... aŭ ĉesis esti Esperantistoj ».

S-ro CHAVET opinias, ke oni eble povus akcepti similan regulon, kiel ordinaraj societoj. La Akademio decidus pri eksigoj, kaj la eksigitoj povus apelacii al la Lingva Komitato.

S-ro ARTIGUES demandas, ĉu la eks-Esperantistoj daŭrigas res-

pondadi la leterojn kaj cirkulerojn. Se ne, ili do povus esti konsiderataj, kiel ekzigintaj.

S-ro BOIRAC respondas, ke ili efektive daŭrigas respondadi kaj eĉ aldonas al siaj respondoj longajn teoriajn disertaciojn.

* * *

Ĉar estas plene traktitaj ĉiuj demandoj en la tagordo, S-ro Boirac demandas, ĉu iu Lingvokomitato havas ion pluan por diri?

S-ro INGLADA deziras prezenti kelkajn rimarkojn pri la komuna vortaro. En la listo da 800 novaj ĵus oficiale akceptitaj, oni klarigis la sencon de la radikoj per tradukoj en kelkaj lingvoj, kiel estis farite en la Universala Vortaro. Tiu ĉi metodo prezentas du malbonaĵojn : 1^o Estas malfacile doni tradukojn en aliaj lingvoj, krom sia propra; 2^o La Esperantistoj, apartenantaj al aliaj lingvoj krom la kvin elektitaj, ne havas tradukon. Tial S-ro INGLADA proponas klarigi nur per Esperanto la sencon de la radikoj. Por respekti la Fundamenton, estas necese ĝin bone koni. Nu, en la Universala Vortaro oni trovas, ekzemple, por la verbo *sidi* la francan tradukon *être assis*; sed tio evidente ne estas la senco de *sidi* en la ekzemplo « kiel bone *sidas* la vestoj de la reĝo ». Bone estus zorge difini ĉiujn sencojn en Esperanto mem. La parolanto scias, ke tio ĉi estas sufiĉe malfacila. Sed ankaŭ por traduko per naciaj vortoj, la tasko estas malfacila, ĉar, kiel montris S-ro Cart, la nacilingvaj tradukoj ne « kovras » unuj la aliajn. La vortaro, ĵus publikigita de S-ro Boirac, montras la bonan vojon. Oni ĉiam povus aldoni al la difinoj, novajn sencojn, kiel oni faras en naciaj lingvoj, kaj, tiel, farante la difinojn en Esperanto mem, la demando estus tuj solvita.

S-ro CART atentigas, ke klarigado de la senco de radikoj *nur* en Esperanto kaj *sen naciaj tradukoj* estas praktike tre malfacila. Nedetala difino povas ja taŭgi por diversaj objektoj. Se oni petus, ekzemple, kelkajn germanojn, ke ili traduku per germanaj vortoj la difinojn en unu paĝo de franca vortaro, la rezultato certe estus, ke samajn difinojn ili tradukus per malsamaj vortoj : unu tradukus per *tablo* difinon, kiun alia tradukus per *pupitro*, k. t. p. Tiun praktikan malfacilecon S-ro Cart aparte konstatis per sia propra profesora sperto : en francaj liceoj tre ofte eraras en siaj tradukoj lernantoj de germana lingvo, kiuj nur uzas vortarojn, en kiuj la germanaj vor-

propono pri internacia vortaro esperantu-esperanta

toj estas klarigitaj per difinoj en germana lingvo. Ŝajnas tamen tute akceptinde, ke la Akademio entreprenu la tre interesan laboron proponatan de S-ro INGLADA, komence almenaŭ pri la vortoj de la Universala Vortaro.

S-ro INGLADA konfesas, ke tiu laboro estos sendube malfacila kaj malrapida, sed tamen oni devas ĝin iam komenci.

S-ro de SAUSSURE rimarkigas, ke la Lingva Komitato ne estas kompetenta por akcepti mem tiajn demandojn. Oni devas ilin proponi unue al la Akademio, kiu siavice povos ilin proponi al la Lingva Komitato. Oni nur povas diri, ke la Lingva Komitato, kunveninte en Barcelono, proponas ilian studadon al la Akademio.

S-ro BOIRAC respondas, ke efektive oni devas fari la proponojn al la Direktoroj.

* *

Transirante al alia demando, li diras, ke estus tre dezirinde, ke en ĉiu lando ekzistu komisio rilata al la Gramatiko aŭ al la Vortaro, kiu esplorus ĉiujn verkojn aŭ gazetajn artikolojn, aperantajn en tiu lando. Tio liverus tre utilan materialon por la gramatiko kaj por la vortaro. Sed ŝajnas, ke la Lingvokomitatoj ĉiam atendas proponojn por labori; ili mem devus proponi laborojn. Al ili iom mankas iniciatemeco.

S-ro BOURLET rimarkigas, ke la verko *Versions* de S-ro AYMONTIER estas bonega tiaspeca laboro, en kiu la aŭtoro kolektis kaj ordigis multajn ekzemplojn, ĉerpitajn precipe el verkoj de D-ro ZAMENHOF. Li sciigas, ke ankaŭ sialflanke S-ro WACKRILL traserĉis en la verkoj de nia Majstro ekzemplojn de la uzado de ĉiuj vortoj de la Universala Vortaro. Do tamen ekzistas iniciatemeco ĉe la Lingvokomitatoj.

S-ro INGLADA ankaŭ memorigas, ke jam antaŭe la kvar hispanaj Lingvokomitatoj kune prezentis proponon pri esperanta-esperanta vortaro, sed ne ricevis respondon.

S-ro BOIRAC voĉdonigas pri la sekvantaj proponoj de la Lingva Komitato al la Akademio: Estas dezirinde: 1° Ke estu starigita komisio, por prepari precizan difinon kun ekzemploj de la vortoj en la Universala Vortaro; 2° Ke por ĉiuj lingvoj ekzistu komisioj el Lingvokomitatoj, por konstante esplori ĉiujn aperantajn eldonaĵojn. — Tiuj ĉi ambaŭ proponoj estas unuanime akceptataj.

* *

S-ro BOBIN rimarkigas, ke ĉar multaj Eŭropaj Lingvokomitatoj sendube ne povos veturi al la VI^a Kongreso en Ameriko, estus bone, se okazus en Eŭropo kelkaj kunsidoj de la Lingva Komitato antaŭ la forveturo.

S-ro MUDIE proponas, ke tiuj kunvenoj okazu ĉu en Dijon, kie loĝas la Prezidanto, ĉu en havenurbo, kie enŝipiĝos la kongresanoj.

* *

S-ro CART proponas, ke la Akademio donu ĉiujare kelkajn premiojn al la plej bone kaj pure verkitaj inter la aperintaj verkoj. Tiuj premioj ne estus monaj, sed nur konsistus en la titolo « Kronita de la Akademio ». Tiu ĉi titolo per si mem ja sufiĉus por certigi bonan vendadon, kaj tiamaniere la premioj estus tamen profitodonaj por la meritintoj. Ĉar malbonaj verkoj ne ricevus premiojn, ĉiuj aŭtoroj estus instigataj skribi plej korekte. Tio povus ankaŭ utili kiel modero por junuloj, kiuj senpripense enkondukas multajn novajn vortojn kaj sufiksojn. Kompreneble, ricevus premiojn nur presitaj verkoj, ne manuskriptoj.

S-ro BOIRAC proponas ankaŭ starigi konkursojn pri difinitaj temoj, ekzemple por la plej bona verko pri uzado de akuzativo. — Li voĉdonigas pri tiuj proponoj. Ili estas unuanime akceptataj.

S-ro PRIVAT atentigas, ke oni donu ĉiujare nur difinitan nombron da premioj, ekzemple ne pli ol dek.

S-ro CORRET demandas, ĉu la komisioj el Lingvokomitatoj por difino de la vortoj en la Universala Vortaro kaj por esploro de la diversaj aperantaj verkoj povos aldoni al si membrojn, ne apartenantajn al la Lingva Komitato, kiel jam faris S-ro Grabowski por la komisio pri Gramatiko? Ekzistas ja multaj privataj Esperantistoj, kiuj tre volonte kunlaborus kaj tiel donus al la Lingva Komitato tre utilan kaj efikan helpon.

S-ro BOIRAC respondas, ke la regularo efektive permesas tian aldonon.

Ĉar neniu komitatano deziras ekstrakti pluan demandon, S^{ro} BOIRAC
fermas la kunsidon je la 10^a 1/4, dezirante revidon de la ĉeestantaj
kolegoj en la venonta jaro.

La Sekretario de la Kunsidoj,

DOKTORO PIERRE CORRET.

La Prezidanto,

Rektoro E. BOIRAC.

KONSTANTA KOMITATO DE LA KONGRESOJ.

*Protokoloj de la ĝeneralaj kunsidoj de la
Kvina Kongreso.*

Solena Malferma Kunsido (6 septembro 1909.)

La Solena Malferma Kunsido estas malfermata je la 10^a horo, en la Palaco de Belartoj.

Doktoro MYBS, prezidinto de la Kvara Kongreso, malfermas la kunsidon, kaj sciigas, ke la Konstanta Komitato de la Kongresoj decidis proponi al la Kongreso la jenan estraron, kiu estas akceptata.

Prezidanto Frederiko PUJULA Y VALLÈS.
Vicprezidantoj . . . Kapitano PEROGORDO.
Alfonso SABADELL.
Sekretarioj Gabriel CHAVET.
Sinjorino Germaine REBOURS DE PUJULA.

Sinjoro PUJULA prenas la prezidantan lokon, kaj dankas la Kongreson pro la honoro farita ne al li, li diras, sed al la movado de Barcelono kiu estas tre vivplena, ĉar la urbo enhavas tri mil esperantistojn. Li finas, dezirante al la Kongresanoj, plej bonan restadon en la urbo, kaj al la Kongreso, plej grandan sukceson.

Doktoro ZAMENHOF faras sian kutiman malferman paroladon, kaj dankas la Hispanan Registaron, la Urbestaron de Barcelono kaj la Lokan Komitaton. Lia parolado estas varmege aplaŭdata.

Sinjoro PUJULA, prezidanto, proponas sendi dankan telegramon al Lia Moŝto la Reĝo Alfonso XIII^a, al Princo KAROLO DE BORBON kaj al ĉiuj Ministroj. Tiu propono estas akceptata.

Sinjoro LAIRET, urbestro de Barcelono deziras bonvenon al la Kongreso, kaj esprimas la deziron, ke Esperanto estu baldaŭ alprenata, kiel ilo por kunigi la popolojn.

* * *

Sinjoro Gabriel CHAVET, sekretario, legas la nomojn de la oficialajn delegitoj de la Registaroj, de la naciaj vicprezidantoj kaj delegitoj elektitaj en la antaŭaj naciaj kunvenoj.

Delegitoj de la Registaroj.

Belgujo... S^{roj} VAN DER BIEST-ANDELHOF kaj OSCAR VAN SCHOOR.
Norvegujo. S^{ro} SCHYBBIE.
Usono..... S^{roj} HERBERT HARRIS kaj EDWIN REED.

Naciaj Vicprezidantoj.

Belgujo VAN DER BIEST-ANDELHOF.
Britujo..... ALFRED E. WACKRILL.
Francujo..... TH. CART.
Germanujo DOKTORO KANDT.
Scisujo..... RENÉ DE SAUSSURE.
Usono. HERBERT HARRIS.

Naciaj Delegitoj.

Aŭstrio.

Germana lingvo GOTTSCHALL.
Bohema lingvo KUBIČEK.
Bosnio..... SCHWARZ.
Dalmatio..... FERRY.

Belgujo..... PASTRO RICHARDSON.

Britujo.

Angla lingvo..... H. BOLINGBROKE MUDIE.
Skotoj..... WILSON.
Gibraltaro..... EDWARD.
Malto..... H.-B. MUDIE.
Irlando..... PARKER.

Brazilujo..... JOAO KEATING.

<i>Finlando</i>	VON FRENCKELL.
<i>Francujo</i>	DECOURT, DRUDIN.
<i>Hispanujo.</i>	
Astura lingvo	BRAGA.
Kataluna lingvo	DOKTORO BREMON Y MASGRAU.
Kastila lingvo	KAPITANO PEROGORDO.
Valencia lingvo	AGUILAR.
Vaska lingvo	ALLENDE.
<i>Holando</i>	VERMAES, ODUFRE.
<i>Germanujo</i>	DOKTORO ARNHOLD, PETZOLD.
<i>Hungarujo</i>	A. MARICH.
<i>Italujo</i>	A. TELLINI.
<i>Koŝinhinujo</i>	CARRER.
<i>Peruo</i>	KAPITANO PEROGORDO.
<i>Respubliko Arĝentina</i> ...	ALBIÑANA, PUJULA.
<i>Rusujo</i>	DOKTORO OSTROVSKI, SINO SMIRNOV.
Pola lingvo	A. GRABOWSKI, RUDNICKI.
Georgio	CIKLARI.
<i>Samos</i>	STAMATHADES.
<i>Turkujo</i>	JACQUES GUÉRON.
<i>Svisujo</i>	EDMOND PRIVAT.
<i>Svedujo</i>	FILLER.
<i>Usono</i>	EDWIN REED, ARTHUR BAKER.



Poste parolas S^{roj} VAN DER BIEST, je la nomo de la Belga Registaro, S^{ro} E. REED, je la nomo de la Usona Registaro, S^{roj} KUBIČEK, por la bohemoj, KEATING, por la brazilanoj, MUDIE, por la angloj. S^{ro} MUDIE alportas al la Kongreso la bedaŭrojn de Kolonelo Pollen; S^{ro} EDWARD parolas, je la nomo de Gibraltar, kaj donacas al Doktoro ZAMENHOF gvidlibron de Gibraltar, en Esperanto.

S^{ro} WILSON parolas je la nomo de la skotoj, MUDIF, por Malto, von FRENCKELL por Finnlando, lando de neĝoj. Pastro PARKER, je la nomo de Irlando deziras ke Dio gardu Zamenhof kaj Esperanton. Pastro RICHARDSON, je la nomo de la belgoj, esprimas la esperon, ke proksima Kongreso okazos en Belgujo, kaj sciigas pri la fondo de *Belga Esperantisto*.

S^{ro} DECOURT parolas je la nomo de la Francoj. Kapitano PEROGORDO, je la nomo de hispanoj de kastila lingvo kaj de Peruo, alportas la senkulpigojn de S^{ro} Ricardo CODORNIU. S^{ro} ALLENDE parolas je la nomo de vaska lingvo, kaj BRAGA, je la nomo de astura lingvo. S^{ro} AGUILAR (je la nomo de valencia lingvo) invitas la Kongreson viziti la urbon Valencio, je la nomo de la Konsilantaro de la Ekspozicio. S^{ro} BREMON Y MASGRAU (je la nomo de kataluna lingvo) ĝojas, ke kataluna lando havas lokon inter la progresemaj landoj, kiuj forte propagandas Esperanton.

Doktoro ARNHOLD, je la nomo de la Germanoj, memorigas pri la granda sukceso de la Kongreso en Dresden. S^{ro} VERMAES, parolas por la nederlandanoj, S^{ro} A. MARICH (je la nomo de la hungaroj) aludas pri propagando por Esperanto farita en la lasta medicina kongreso de Budapeŝto.

S^{ro} TELLINI, por la Italoj, ALBIÑANA, por la Respubliko Argentino, GRABOWSKI por la poloj, OSTROVSKI, por la rusoj, CIKLARI, por Georgio, STAMATIADIS, por Samos, ankaŭ parolas. S^{ro} PRIVAT, por la Svisoj, memorigas pri la enkonduko de Esperanto en la lastan Kongreson de psikologio de Genevo, kaj dankas Doktoron ZAMENHOF, je la nomo de la svisoj, ĉar li ĉiujare venas al la Kongreso.

S^{ro} CARRER, je la nomo de la esperantistoj de Koŝinĥinujo, alportas la varmajn dezirojn de la varma lando. S^{ro} Jacques GUÉRON, je la nomo de turkaj esperantistoj, diras, ke Turkujo estas kvazaŭ babelaturo, kin tre bezonas Esperanton, kaj S^{ro} Arthur BAKER, je la nomo de Usonanoj, diras, ke ĉar ĉiu eŭropano havas parencon en Ameriko,

li invitas ĉiujn Kongresanojn iri, la proksiman jaron, viziti siajn amerikajn parencojn, dum la Sesa Kongreso.

* *

S^{ro} G. CHAVET, sekretario, legas liston de la urboj kaj societoj kiuj oficiale aliĝis al la Kongreso.

Urboj.

Carcagente.
Sant Esteba de Castellá.
Terrassa.
Valencia.
Vilanova y Geltru.

Societoj.

Institut Catalá de les arts del llibre.
Unió Catalanista.
Academia de Farmacéutichs.
Ateneo encicopedich Popular.
Societo *Catalunya Vella* de Sabadell.
Societat Vegetariania de Barcelono.
Societat de Atracció de Forasters.
Societat Protectora d'Animals y Plantes.
Academia de Medicina.

* *

S^{ro} G. CHAVET, sekretario, legas multajn telegramojn kaj leterojn, kiuj venas de ĉiuj lokoj de la mondo kaj alportas al la Kongreso la salutojn kaj bondezirojn de societoj esperantistaj kaj izolataj samideanoj.

* *

Doktoro ZAMENHOF sciigas pri la bedaŭrindega morto de Fraŭlino Marie SCHRÖDER el Copenhague, kiu falis de monto, en Svisujo, dum sia vojaĝo al Barcelono. Li proponas, kaj la Kongreso akceptas, ke oni sendu kondolencan telegramon al ŝia patrino.

La kunsido estas fermata, je la 1^a horo.

Unua Labora Kunsido (6 Septembro 1909).

La unua labora kunsido esta malfermata je la 4-a horo, en la Palaco de Belartoj, sub la prezido de S-ro PUJULA, prezidanto.

Sinjoro Gabriel CHAVET, sekretario, legas la protokolon de la solena malferma kunsido, kiu estas aprobata, post kelkaj aldonoj.

* *

Sinjoro PUJULA, prezidanto, legas tekston de telegramoj sendotaj al Liaj Moŝtoj la Reĝo, Princo Karolo, ĉiuj Ministroj kaj al S-ino Schröder.

S-ro Doktoro MYBS, prezidinto de la Kvara Kongreso, proponas, kaj la Kongreso aprobas, ke oni sendu telegramon al la Reĝo de Sakso, kiu estis la Honora Protektanto de la Kvara Kongreso.

S-ro G. CHAVET, sekretario, legas multajn salutajn telegramojn ricevitaĵojn de la antaŭa kunsido. Inter ili estas telegramo de S-ro Codorniu. S-ro PUJULA, prezidanto, proponas, kaj la Kongreso aprobas, sendi al li respondan telegramon.

* *

S-ro GOTTSCHALL salutas la Kongreson, je la nomo de la germanlingvaj aŭstrianoj, S-ro FILLER, je la nomo de la svedoj, S-ro FERRY, por Dalmatio kaj S-ro SCHWARZ, por Bosnio.

Sinjoro WICART, je la nomo de la Konfederacio de Komerco kaj Industrio de Francujo, salutas la Kongreson. Li diras, ke tiu Konfederacio sendis al al Kongreso du oficialajn delegitojn, S-ron Marseille kaj lin. Li aldonas, ke la Konfederacio havas 20 000 anojn, kaj 205 aliĝintajn grupojn, kaj ke Esperanto povos ludi tre gravan rolon en la komerco kaj industrio.

* *

S-ro G. CHAVET, Ĝenerala Sekretario de la Konstanta Komitato de la kongresoj, parolas pri la tagordo de la Kongreso. Li diras, ke, post resendo al la Lingva Komitato de la proponoj pri lingvaj demandoj, kiuj alvenis de S-roj J. Camescasse, O. Chalon kaj A. Zinoviev, kaj al la specialistaj kunvenoj, de la proponoj, kiuj bezonas specialistan

antaŭan esploron, la Konstanta Komitato de la Kongresoj decidis proponi al la Kongreso la jenan tagordon :

Por la unua kunsido :

1. Paroladoj pri propagando (S-roj BLAISE kaj MANN);
2. Propono de Centra Komercejo, pri insignoj;
3. Propono de la Grupo de Godesberg pri esperantista restadejo.

Por la dua kunsido :

Propono pri ĝenerala reprezentantaro, kaj flankaj proponoj.

Por la tria kunsido :

Raporto de S-ro Prezidanto de Lingva Komitato kaj Akademio ;
Raportoj de la specialistaj kunsidoj ;
Demando pri la datoj kaj lokoj de la estontaj kongresoj.

• •

S-ro W. W. MANN starigas kelkajn principetojn *pri propagando*, kaj parolas pri la *ĉiueco* kaj *ĉieeco* de nia propagando. Ĉia esperantisto devas, ne nur ŝati sed ankaŭ propagandi la lingvon, kaj tio estas la devo, ne nur de la esperantistoj, sed ankaŭ de la esperantistinoj; kaj li citas la nomojn de F-ino Lawrence, de S-ino Marie Hankel, Baronino de Ménil, S-ino Rebours de Pujula. Plie, S-ro Mann diras, ke oni devas propagandi ĉie, eĉ en la subteraj vagonaroj, kaj en la specialaj kongresoj. Li opinias, ke ĉiu devas esti libera agi laŭ sia bontrovo, kaj tio estas signo de fideleco al Zamenhof, homo modesta kaj ne altrudema.

S-ro BLAISE parolas pri propagando, ĉe komercistoj. Li citas du rimedojn por tiu propagando, 1^e la uzon de la ŝlosiloj Ĉefeĉ, 2^e la uzon de la Ĉekbanko esperantista.

S-ro MUDIĜ diras, ke oni devas ĉiam havi ŝlosilojn de Cefeĉ en siaj poŝoj kaj diras, kiel ekzemplo, ke dum lia lasta vojaĝo li disdonis pli ol tri cent el ili. Li finas petante la permeson uzi vorton, kiu ne estas en la Universala Vortaro, kaj diras « Ni *ramblante* propagandu » !!

S-ro T. CART rakontas, ke li trovis Ĉefeĉajn ŝlosilon je 2000 metroj de alteco, en biblioteko de svisa vilaĝo.

S-ro V. ALLENDE, el Bilbao, diras, ke la gazetoj devus esti redaktataj nur en Esperanto, kaj ke tiamaniere, ili estus multe pli utilaj por nacioj kaj por fremduloj.

S-ro E. PRIVAT kontraŭdiras tiun opinion, kaj diras, ke oni devas verki la nacian kronikon de la naciaj ĵurnaloj en Esperanto, por ke ĝi estu legata de la fremdaj esperantistoj, kaj en nacia lingvo la raportojn pri la eksterlanda propagando.

* * *

S-ro G. CHAVET, sekretario, legas proponon de la Centra Komercujo por Esperantujo, pri *insignoj*. Oni proponas, ke ĉiu insigno esperantista subhavu la signon por montri la naciecon de la portanto, ekzemple malgrandan nacian flagon.

S-ro DIEMER, el Köln, montras specialan insignon glueblan sur la vitroj de la vagonoj.

S-ro STEIER, germano, parolas pri la propono de la Centra Komercujo, kiun li reprezentas.

S-ro PICHON, franco, opinias, ke nebone estas ke la Esperantistoj vojaĝu en specialaj vagonoj, ĉar tio malhelpas, ke ili propagandu.

S-ro DIEMER respondas, dirante, ke li ne volis diri, ke la Esperantistoj devas vojaĝi en rezervitaj vagonoj.

* * *

S-ro G. CHAVET, sekretario, legas la proponon de la Grupo de Godesberg, kiu proponas *konstantan esperantistan restadejon*.

* * *

La kunsido estas fermata je la 7-a horo.

Dua Labora Kunsido (9 septembro 1909).

La dua labora kunsido estas malfermata je la 10-a horo, en la Paraninjo de la Universitato.

S-ro F. PUJULA prezidas.

S-ro G. CHAVET, sekretario, legas la protokolon de la unua labora kunsido kiu estas aprobata, sen rimarko.

S-ro F. PUJULA legas telegramojn de Lia Reĝa Moŝto de Hispanujo, de la Ministraro, kaj de la Ministroj de Publika Instruado, de Enlandaj Aferoj, de Eksterlandaj Aferoj kaj de Milito.

* *

Poste estas legataj telegramoj ricevataj de diversaj esperantistaj societoj aŭ personoj, kaj nome de Profesoro Kroita, de Tokio, kaj de Kolonelo Harvey.

* *

S-ro René BECK parolas pri la *esperantista gazetaro*. Li memoriĝas, kiel malaperis kelkaj ĉefaj esperantistaj gazetoj, nome « Tra la Mondo », « Espero Pacifista », « Bela Mondo ». Li diras ke « Oficiala Gazeto » havas gravan deficiton. Tamen, la abono al tiuj gazetoj estas tre malkara.

S-ro Beck, por forigi, en la estonto, tiujn malfeliĉajn malsukcesojn, proponas, ke la Kongreso esprimu la deziron ke :

1. oni ne fondu novan gazeton, kiam ĝi ne estas nepre necesa ;
2. por ĉiuj grupoj fariĝu deviga la abono al Oficiala Gazeto, al kelkaj ĝeneralaj kaj specialaj gazetoj, kaj al la nacia propaganda gazeto.

S-ro Gabriel CHAVET, Ĝenerala Sekretario de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, prenas la parolon je la nomo de tiu Komitato.

Li opinias, ke la propono de S-ro René BECK estas nur unu flanko de pli alta kaj pli ĝenerala demando, t. e. la demando pri ĝenerala interkonsento, kaj pri interligo inter la propagandaj societoj. Li memoriĝas, ke, de la komenco de Esperanto, projektoj pri tia organizo estis prezentitaj. En la Kongreso de *Boulogne-sur-Mer*, oni prezentis tiajn projektojn, el kiuj unu venis de nia Majstro mem. En tiu epoko, la propagandaj societoj estis ankoraŭ nemultaj, nefortaj, kaj tro dissemitaj. La Unua Kongreso nur decidis, ke la demando ne estas matura, kaj ke la Organiza Komitato de la Kongresoj, studu ĉiujn proponojn pri sama temo.

Nun, kelkaj gravaj simptomoj ŝajnas montri, ke, post kvar jaroj, la demando maturiĝis.

Unue, multaj societoj kaj grupoj sendas al la Kongreso rajtigitajn reprezentantojn, montrante tiamaniere, ke ili sentas la bezonon havi iun, kiu povus rajte paroli je ilia nomo.

Due, dum la lasta jaro, la Konstanta Komitato de la Kongresoj ricevis gravan nombron de proponoj pri ĝeneralaj organizaj temoj. Krom la propono de S-ro René BECK, oni ricevis proponojn :

De la *Grupo de Toulon* (Francujo) (organizo de granda internacia loterio por finance subteni la propagandon);

De la *Grupo de Le Creusot* (Francujo), pri Centra Organizo por Esperantantista propagando;

De S-ro *Uhlmann*, prezidanto de la Svisa Propaganda Komitato, pri kreo de Tutmonda Esperantista Ligo;

De la *Grupo de Leitmetritz*, pri kotizoj de ĉiuj grupoj;

De S-ro *Hoa*, ĥina esperantisto, pri financa komitato;

Kaj fine de la *Esperantista Asocio de Norda Ameriko*, kiu oficiale sendis plenan projekton de organizo de ĝenerala reprezentantaro de la esperantistaj societoj de propagando.

Resume do, ŝajnas, ke oni deziras ian centran organizaĵon, kiu povus paroli kaj agi je la nomo de ĉiuj esperantistoj kaj finance subteni la oficialajn esperantistajn instituciojn.

Tia organizaĵo estus tre utila, nome por la klopodoj apud la registaroj. Por tiuj klopodoj, oni nepre bezonas paroli je nomo de internacia organismo.

La Konstanta Komitato de la Kongresoj zorge esploris la proponojn ricevitaĵajn kaj por esti certa, ke tia afero estas realigebla, ĝi penis starigi ian detalan provizoran redaktaĵon. Tiu redaktaĵo estus nur provizora, kaj taŭgus nur por la unua reprezentantaro, kiu mem decidus rajte pri la estonto.

Tiu organizaĵo flanken lasus la lingvajn demandojn rezervitajn al la Lingva Komitato kaj Akademio, la propagandon en specialaj landoj kaj regionoj, rezervitan al la landaj societoj, kaj la propagandon en ia speciala fako, rezervitan al la fakaj societoj.

Por krei tiun organismon, oni bezonus havi regulan enskribon de la societoj, por ke ĉiu enskribita societo celus nur la propagandon de la lingvo de Zamenhof.

Oni parolas nur pri la propagandajn societojn, ĉar nuntempe, la esperantistoj, kiuj aliĝas al fakaj societoj estas la samaj, kiuj aliĝas ankaŭ al la propagandaj.

Oni respondos eble, ke la Esperantistoj ne volas estrojn, sed tia projekto igus la esperantistojn mem siaj propraj estroj.

S-ro CHAVET legas tekston de deziro, preparita de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, kaj de la Estraro de la Kvina Kongreso, kaj aprobita unuanime, escepte unu voĉo, de la naciaj delegitoj de la Kvina Kongreso, kiuj ĉeestis kunvenon aranĝitan en tiu celo.

Jen tiu teksto :

La Kongreso esprimas la deziron ke :

1. *Estu fondita, aparte de la Lingva Komitato kaj de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, Administra Re prezentantaro de la propagandaj societoj, por oficiale reprezenti la Esperantistajn propagandajn societojn, en ĝeneralaj okazoj, kaj zorgi pri la funkciado de la oficialaj institucioj de Esperanto.*

2. *Tiu Re prezentantaro estu elektita de la diversaj propagandaj societoj de Esperanto, proporcie je ilia multmembreco, po unu delegito por mil Esperantistoj, laŭ metodo difinita de la unua re prezentantaro.*

3. *La unua tasko de tiu Re prezentantaro estu starigi specialan regularon por finance subteni la oficialajn instituciojn de Esperanton.*

4. *La unua Re prezentantaro estu elektita laŭ provizora regularo difinita de la Konstanta Komitato de la Kongresoj.*

Tiu teksto, aldonas S-ro CHAVET, celas nur eblegi la unuan elektadon de reprezentantoj, kiuj poste decidis mem pri la detala organizo de la tuta afero.

S-ro Marcel BOBIN rimarkigas ke nur tri tagojn antaŭ tiu kunsido, oni estis informita pri la propono, kaj estas neeble, ke la diskuto fariĝu preciza. En la Kongreso de *Boulogne-sur-Mer*, simila propono estis forŝovita de la Kongreso, post studo en la diversaj gazetoj, en paroladoj k. t. p.

Plie, en la Kongreso de Genevo, oni ankaŭ decidis nemeti tiun demandon en la tagordon.

Nun ĝi reaperas diskrete.

S-ro BOBIN esprimas la timon, ke la projektita organizaĵo trudos siajn dezirojn al la Lingva Komitato kaj Akademio, kaj ankaŭ, ke, se

ni havas regula rajtigita reprezentantaro de niaj societoj, la Delegacio provus denove proponi al ĝi siajn lingvajn reformojn.

Fine, oni devas peti tempon por serioze pripensi la aferon.

S-ro DOUGLAS opinias, ke oni ne devas preni tujan decidon, sed sendi ekzemplerojn de la projekto al ĉiuj societoj, kiuj resendus siajn avizojn.

S-ro Rektoro BOIRAC diras, ke li ĉeestis ĉiujn kunsidojn de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, dum kiuj la projekto estis studita, kaj ke li plene aprobas la raporton.

Li havas plenan konfidon al la fideleco de la naciaj societoj kaj grupoj. Ne estas eble, ke tiuj reprezentantoj perfidus nian aferon, por interkonsenti kun la jam mortinta Delegacio. Cetere, la Lingva Komitato ankaŭ bezonas rajtigitan bazon. Ĝis nun, ĝi havis nur fidan, moralan bazon, kaj tion oni ja riproĉis al ni. Oni diris, ke sufiĉas Lingva Komitato kaj Akademio. Sed tiuj institucioj bezonas monon. De kie ĝi venis, ĝis nun? De kelkaj malavaraj amikoj. Sed ĉu ni devas deziri kaj esperi ke tio daŭros senfine? La mono devas veni de la tuta Esperantistaro, ĉar tiuj institucioj laboras por ĉiuj. Sed kiu kontrolos la uzon de tiu mono? Nur rajtigitaj. Tio estas la internacia principo, ke nur rajtigitaj personoj povas kontroli budĝeton. Ni ne povas starigi tiun kontroladon, sen regula reprezentantaro.

S-ro Paul BLAISE parolas kiel sendependa esperantisto. Li diras, ke la projekto estas senutila. Ni memoru, ke la Delegacio, kiu estis starigita nur por elekti lingvon, prenis sur sin la taskon postuli reformojn en nia lingvo. Eĉ, se nun, la proponita organismo normale funkcius, venus certe fieruloj, kaj altrudemaj personoj, kiuj volus estri la aferon. Li kredas, ke la naciaj societoj povos rilatigi senpere kun la Centra Oficejo. Tio, kio ekzistas, sufiĉas. Zamenhof kreante la lingvon, kaj donante ĝin al ni, ne parolis pri kotizaĵoj.

Cetere, flanke de la societoj estas miloj de esperantistoj, kiuj restas izolataj. Plie, estas societoj, kiuj havas malmulte da membroj, kaj kiuj do ne estus reprezentataj.

Estas necese, ke ĉiu esperantisto sendu sian avizon pri la afero.

S-ro BLAISE finas, dirante ke, vojaĝinte en Belgujo, Francujo kaj Anglujo, li ĉie konstatis, ke la esperantistoj ne volas esti regataj.

S-ro G. CHAVET diras :

1. Anstataŭ doni estrojn, la projekto estrigas la esperantistojn mem.

2. Estas facile fiksi regularon, kiu ebligos la reprezentadon de la plej malgrandaj societoj.

3. Ne estas eble ke la Centra Oficejo, ricevu monon, ne lasante al la donintoj, la rajton kontroli ĝian uzon.

4. Oni diris ke Esperanto estas nur lingvo. Sed Esperanto estas en la situacion de tiuj lingvoj, kiuj ne povas sin apogi sur naciaj politikaj ŝtatoj, kaj devas esti subtenataj kaj konservataj per la zorgo de specialaj societoj, agadoj kaj institucioj.

5. Pri la utileco de la projektita organizaĵo por la klopodoj apud la registaroj, S-ro CHAVET rakontas la klopodojn de S-ro Generalo SEBERT apud la francaj ministroj, klopodoj kiuj malsukcesis, ĉar S-ro Generalo SEBERT ne povis paroli je la nomo de forta internacia anaro.

S-ro Frederiko PUJULA, prezidanto de la Kongreso, citas la fakton, ke kiam li volis malfermigi konton en Banko, je la nomo de la Kvina Kongreso, li konstatis la mankon de la oficiala rajtigilo.

S-ro W. W. MANN opinias, ke la demando ne estas klara. Estas konfuzo inter Akademio kaj propagando. Ĉu oni submetis la projekton al la naciaj societoj? Li deziras ke oni unue difinu la financon rolon de la estonta organizaĵo. Pri la Lingva Komitato, li aprobas la partoprenon de la Esperantistoj en ĝia financa subtenado.

Por naciaj klopodoj, li opinias, ke la naciaj societoj sufiĉas. Kial krei novan organon? Por starigi ĝustan liston de societoj, oni bezonas sin turni nur al la naciaj societoj. Centra Oficejo devas esti statistikejo kaj arkivejo. Oni difinu sian rolon kaj ĝi trovos facile apogojn. Oni ekzameni la demandon dum la posta jaro, kaj oni prezentu ĝin, post zorga studo, al la proksima Kongreso.

Doktoro MYBS diras, ke ĉiuj germanoj deziras tiun reprezentantaron. En la germana Kongreso de Gotha, simila propono estis plene aprobita. Rilate al la fideleco, ni havas bonan garantion en la Lingva Komitato. Prokrasto estas morto. Cetere, la diskuto estas nur pri la principo. Por la detalaj reguloj, ni havas tempon. Li tute kaj energie aprobas la proponon.

Sinjoro DECOURT metas la demandon nur sur la financa punkto. Ni havas du organojn: Lingva Komitato kaj Konstanta Komitato de la Kongresoj. Sed la Kongreso de *Boulogne-sur-Mer*, kiu kreis ĝin, forgesis doni al ili monon, por vivi. Se oni povos esperi, ke la Centra

Oficejo ĉiam ricevos monon de malavaraj amikoj, oni devos tamen timi, ke ili ne eterne estos sufiĉe riĉaj. Ni devas do provizi per monojn instituciojn. En kelkaj landoj, la naciaj societoj povos alcentrigi la mondonacojn. Sed estas landoj, kie la nacia societo ne enhavas la tuton, kaj eĉ ne la plimulton de la enlandaj grupoj; aliaj landoj, kie la nacia societo mem bezonas peti monon. Sed principe, ni ne devas akcepti almozon, sed subteni mem niajn instituciojn.

Sinjoro MAHN opinias, ke oni bezonas konstitucion. La Lingva Komitato kaj Akademio sufiĉas por la lingva flanko, sed la Konstanta Komitato de la Kongresoj ne sufiĉas por propagando en gravaj okazoj, ĉar sukceso en lando dependas de sukceso en aliaj landoj. Ni bezonas veran internacian organon. La instruistaro pli interesiĝos pri nia afero, se ni estos forte kaj internacie organizitaj, kaj ni ne devas forgesi, ke nia ĉefa celo estas la enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

Sinjoro Rektoro BOIRAC parolas kiel kongresano, kaj rimarkas, ke la Kongreso mem havas nenian rajtigon kaj povas nenion decidi. Ni nur povas esprimi dezirojn kaj ilin prezenti al propagandaj societoj, dirante al ili: Aranĝu kunvenon de rajtigitaj personoj, por esplori la aferon, kaj se ĝi estas ebla kaj necesa, faru ion malpli provizoran. Jen la tuta danĝero kion oni timas, jen la tuta konspiro por ligi la sorton de la esperantistaj societoj.

Tamen, S-ro BOIRAC rimarkas, ke ĉiuj oratoroj konsentas pri la mona demando. Sed neniu alia rimedo ekzistas por solvi tiun demandon, ol havi rajtigitajn kontrolantojn.

Ŝajnas al li ankaŭ ke por propagando, internacia organizaĵo estas necesa, por la enlandaj klopodoj. En Francujo, se mi vizitus la Ministron de Publika Instruado, je nomo de francaj esperantistoj, li respondus: Se vi estas solaj, ne bezonas enkonduki Esperanton en la lernejojn, ĉar por nur francoj, franca lingvo sufiĉas. Estas necese, ke oni povu certigi, ke aliaj landoj agos same. S-ro BOIRAC memorigas, ke la demando estas pri reprezentantoj de jam ekzistantaj societoj, kaj sekve ke oni intencas krei nenion novan. Li aldonas, ke oni nur povas esprimi deziron pri la principo.

S-ro Ferdinand DUVIARD (franco), kiel reprezentanto de la esperantistoj de la estonta tempo, opinias, ke ni bezonas fortan organizaĵon, kiu gardos nin kaj pligrandigos nian aferon.

S-ro G. CHAVET opinias, ke, krom la rimedo montrita de S-ro Boirac

por havi monon, ekzistas ankaŭ la almozpetano, kaj esperas ke neniu volas tiun rimedon.

Li respondas al S-ro MANN, ke por fari ĝustajn statistikojn, oni bezonas regulan organizaĵon.

Pri la proksima Kongreso, la societoj bezonos kolekti monon por sendi ian kongresanon al Washington, kaj ili certe deziras, ke tiuj senditaj kongresanoj havu efikan povon kaj serioze reprezentu ilin.

S-ro Edmond PRIVAT rimarkas, ke kritikoj ne estas signo de malfido, kaj li dankas la maljunan sed viglan homon, kiu, de tiom da tempo, prenis sur sin la tutan penon. Eĉ tiuj, kiuj ne opinias kiel li, tamen havas konfidon ad li. Li deziras, ke akordiĝo fariĝu plena. Ni devas ĉiuj unuanime konsenti. Li opinias, ke plena akordiĝo povas okazi nur pri la financa flanko de la demando, kaj deziras, ke ni restu sur tiu kampo, ne nin ligante por la nefinancaj aferoj, ĉar por tiuj aferoj, povus okazi ke decido prenita iam nur de la plimulto de la reprezentantoj naciaj estus danĝera por la nacioj de la malplimulto. Ni restu sur la financa demando, kaj ni faros bonan laboron.

S-ro G. CHAVET relegas la tekston proponitan por montri ke en la teksto, la ĉefa demando estas la financa. Li petas, ke oni montru al li la forĵetindajn vortojn, sed montriĝas necese redakti novan tekston.

S-ro Th. CART same opinias, kiel S-ro Privat, ke ni bezonas monon kaj ke ni ne povas forĵeti tiun financon demandon. Sed ni bezonas esplori tekston presitan, kaj la Kongreso ne devas disiĝi antaŭ ol tiu demando estos solvita.

S-ro G. CHAVET diras, ke la Konstanta Komitato de la Kongresoj kaj la Estraro de tiu Kongreso redaktos novan tekston, kiun oni presos kaj disdonos kiel eble plej frue, al la kongresanoj, kaj kiu estos proponita al la proksima kunsido.

La kunsido estas fermata je la 1-a horo.

Tria labora Kunsido (11 septembro 1909).

Le tria labora kunsido estas malfermata je la 10-a horo, en la Paraninfo de la Universitato.

S-ro Frederiko PUJULA prezidas.

S-ro G. CHAVET, sekretario, diras, ke la protokolo de la antaŭa kunsido povos esti legata nur en la ĝenerala ferma kunsido, kaj ke en tiu sama kunsido okazos la fino de la diskuto de la demando pri ĝenerala organizo.

* * *

S-ro PUJULA, prezidanto, legas telegramon de la Sekretario de LIA MOŝTO LA REĜO, en respondo al tiu, kiun oni sendis, montrante ke la unua telegramo ricevita estis propramove sendita de la Reĝo.

Li legas ankaŭ dankajn telegramojn ricevitajn de la familio de F-ino SCHRÖDER, de Princo CAROLO, de S-ro CODORNIU, kaj de la Konsilantaro de SAN SEBASTIAN, kiu invitas la kongresanojn viziti tiun urbon.

* * *

Sinjoro Rektoro BOIRAC, prezidanto de la *Lingva Komitato kaj de la Akademio* raportas pri la laboroj de tiuj institucioj, inter la Kvara kaj la Kvina Kongreso kaj dum la Kvina Kongreso.

Ĉar tiu raporto estis jam prezentita al la Lingva Komitato, kiu aprobis ĝin, li parolas je la nomo de la tuta Lingva Komitato.

Multaj personoj riproĉas, ke Lingva Komitato kaj Akademio nenion faras. Sed ĉio ne povas esti farita en unu tago, kaj laŭ proverbo, la tempo ne indulgas tion, kio estas farita sen ĝi. Esperanto estas de nun eterna, kaj ni havas antaŭ ni la tutan estonton. Do, ni ne agu senpripense. Ni faru ĉiutage ion, kaj laboro pli kaj pli grandiĝos kaj la Esperantistoj vidos, ke ilia konfido al la Lingva Komitato ne estis trompita.

S-ro BOIRAC resumas la raportojn prezentitajn al la Lingva Komitato, de la direktoroj de la tri lingvaj komisioj de la Akademio.

S-ro GRABOWSKI, kiel direktoro de la Komisio pri gramatiko, respondis al diversaj gramatikaj demandoj, kaj komisiis kelkajn personojn fari monografiojn pri kelkaj punktoj de gramatiko, por ke oni povu starigi, definitivon esperantan sintakson.

S-ro CART, direktoro de la Komisio pri Komuna Vortaro, klarigis

la metodon sekvitan por la elekto de la 800 vortoj aprobitaj, kiel unuan oficialan aldonon al Universala Vortaro. Por tio, oni uzis la verkojn de S-roj Wackrill kaj Boulet, kaj forstrekis ĉiujn vortojn ne aprobitajn de almenaŭ naŭ akademianoj.

S-ro R. de SAUSSURE, direktoro de la komisio pri teknika vortaro, uzis la saman metodon kiel S-ro CART, kaj akceptis nur vortojn pri kiuj interkonsento estas plena, lasante flanken tiujn, kiuj ne ankoraŭ estas aprobitaj unuanime.

Krom tiuj specialaj esploroj tre grava demando, de plej ĝenerala signifo, estis prezentita al la Akademio. En Dresdeno, ni deklaris, ke la supera tasko de Lingva Komitato kaj Akademio estas zorgi pri la konservado de la lingvo kaj kontroli ĝian evolucion. Ni ricevis, de post tiu kongreso, amason da proponoj pri ĉiuj punktoj de la lingvo, sed ĉiu proponanto, laŭ lia diro, celis nur helpi la evolucion, ne kontraŭstarante la fundamentajn principojn. Do, ni devis apartigi, post ekzameno, unuflanke, la proponojn vere konformajn al la principoj de la lingvo; aliflanke tiujn, kiuj celas ŝanĝi esence la lingvon. Ĉar oni diras, ke Lingva Komitato ĉion rifuzas, je la nomo de la fundamentaj principoj, mi decidis, konsente kun Doktoro Zamenhof, remeti la tutan lingvon sur la tablon por esplori kio estas aŭ ne konforma al ĝiaj principoj. Poste, oni povis esperi, ke la demando estos por ĉiam solvita.

En unua cirkulero, mi demandis la Akademianojn do pri ĉiuj punktoj de alfabeto kaj gramatiko. Tiel, oni forigis la proponojn, kiuj reale ŝanĝus la lingvon. Restis la ceteraj proponoj, kiuj celas nur enkonduki neologismojn, kiuj povus esti permesitaj, almenaŭ en kelkaj teknikaj okazoj, kiel ekzemple la sufiksoj OZ, IV, IZ. Tamen, la Akademio ne akceptis rekomendi ilian uzadon en la komuna lingvo. Sciencistoj, se ili bezonas la sufikson OZ, filozofoj, se ili bezonas la sufikson IV, povas ilin uzi, laŭ la senco difinita de la Akademio mem. Cetere, la limo inter scienca kaj komuna lingvo ne estas tre preciza, kaj se la uzo de tiuj novaj sufiksoj fariĝas pli ofta kaj se nenia malhelpo aperos, tiam la Lingva Komitato kaj Akademio povos denove esplori la demandon.

Sed la Akademio unuanime aprobis la proponojn pri la konsiloj por elekto de novaj vortoj kaj pri starigo de principoj de derivado.

Estus necese, ke la estontaj vortaristoj, antaŭ ol enkonduki novan vorton, atente ekzameni, ĉu tiu vorto estas efektive necesa, kaj ne anstataŭigebla; plie, ĉu tiu vorto estas vere internacia kaj fine, ĉu ĝi ne elvokas konfuzon kun jam ekzistantaj vortoj.

Pri la derivado, speciala komisio de Akademianoj provos eldoni specialajn regulojn.

Jen la laboro farita. De nun, pri proponoj de reformoj kaj ŝanĝoj, ni povos tuj rifuzi, ne perdante tempon, kaj oni sin dediĉos al studo de aliaj demandoj kaj aparte de la du punktoj supre montritaj.

Dum la Kongreso de Barcelono mem, la Lingva Komitato prenis la jenajn decidojn :

1. Ĝi decidis pligrandigi la nombron de la Akademianoj, aldonaute unu, du aŭ tri anojn, kaj inter ili unu amerikanon.

2. Ĝi decidis peti de sia prezidanto, ke ĝi esploru la demandon pri aldono al Regularo de regulo, kiu difinas la precizajn kondiĉojn por eksigo de kelkaj anoj, kiuj, ĉu ne partoprenas efike en la laboron de la Komitato, ĉu jam ne plu estas esperantistoj.

3. Ĝi decidis rekomendi al la studo de Akademio du proponojn ;

Proponon de S-ro Inglada, ke oni starigu tradukon en Esperanto de la radikoj de Universala Vortaro.

Proponon de S-ro AYMONIER, ke en ĉiu lingvolando, oni starigu komision kun Lingvokomitatoj kaj bonvolaj helpantoj, por esplori ĉiujn esperantajn verkojn kaj gazetojn kaj elĉerpi novajn vortojn enkondukindajn.

Konklude, diras S-ro Rektoro BOIRAC, la Lingva Komitato kaj Akademio bone laboris, kaj singarde konservis la verajn principojn de nia lingvo. Li aldonas fine, ke la Akademio decidis, laŭ propono de S-ro Cart, fondi premiojn por la plej bonaj verkoj en Esperanto.

S-ro BOIRAC finas memorigante, ke antaŭ la Kongreso de *Boulogne-sur-Mer* li partoprenis en malgranda kongreseto esperantista en Barcelono, kaj feliĉe konstatas la kontraston inter tiu unua kongreseto, kaj la belega nuna Kongreso.



Sinjoro Generalo SEBERT, prezidanto de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, raportas pri la demando de la *estontaj kongresoj*.

Unue li memorigas, ke en la Dresdena Kongreso, oni decidis havi en 1909 du kongresojn, unu en Barcelono, la alian en Ameriko. Sed poste fariĝis tute nebla organizi tiujn du kongresojn en la sama jaro, kaj interkonsente kun la Amerikanoj, la Komitato decidis, ke la Kongreso de Ameriko okazos en 1910.

Samtempe, oni estis decidinta en la Dresdena Kongreso, ke en 1910, okazus kongreso en Belgujo, kie la urbo Antverpeno deklaris esti preta akcepti la kongresanojn. Tre afable la belgaj samideanoj akceptis prokrasti tiun kongreson ĝis 1911.

Do, en tiuj kondiĉoj, la sesa Kongreso okazos en 1910, en Ameriko,

kaj la sepa Kongreso okazos en Antverpeno, en 1911.

Laŭ la reguloj alprenitaj por la Konstanta Komitato, oni devas nun renovigi tiun Komitaton.

Jam inter la Kvara kaj la Kvina Kongreso, la Komitato, laŭ la permeso, kiun ĝi ricevis de la Dresdena Kongreso, devis, pro la cirkonstancoj, elekti novan Ĝeneralan Sekretarion, por anstataŭi S-ron G. Moch, kiu eksiĝis, kaj Vicprezidanton, por helpi la Prezidanton, kaj, se bezonas lin anstataŭi. Ĝi devis ankaŭ elekti du anojn por la Kvina Kongreso, kaj du anojn por la Sesa Kongreso. Ĉiuj tiuj elektoj estis publikigitaj en la *Oficiala Gazeto* (N-roj 6-a kaj 11-a). Nun devas eniri en la Komitato du anoj por la sepa Kongreso. Samtempe, la du membroj de la Tria Kongreso, S-roj Pollen kaj Mudie eksiĝas aŭtomate, laŭ tiu regulo.

La Kongreso akceptas la jam faritajn elektojn kaj aprobas ke, por a sepa Kongreso oni elektu :

S-ron VAN DER BIEST,
S-ron OSCAR VAN SCHOOR.

Fine, S-ro Generalo SEBERT diras, ke la Amerika Kongreso okazos, ne en Chautauqua, kiel oni unue projektis, sed en Washington.

S-ro Edwin REED, je la nomo de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko, kaj de la Komerca Ĉambro de Washington, invitas la kongresanojn iri ĉiuj en tiun lastan urbon. Li diras, ke li klopodos por aranĝi la vojaĝon en plej favoraj kondiĉoj.

S-ro VAN DER BIEST dankas pro la akcepto de Antverpeno por la sepa Kongreso kaj certigas ke tiu Kongreso estos inda je nia bela movado.

S-ro MUDIE legas leteron de Kolonelo POLLEN, kiu certigas ke la sesa Kongreso estos sukcesplena. Li anoncas ke li ĵus revivigis la movadon en Kanado, kaj ke li bedaŭras, ke li ne povis ĉeesti la Kongreson de Barcelono.

S-ro G. CHAVET, ĝenerala sekretario de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, sciigas ke la Komitato ricevis proponojn por okazigi la estontajn kongresojn en la urboj München, Praha, Graz, Krakau, Budapest, Wien, kaj rimarkigas ke la Kongreso povas nur noti tiujn invitojn, sed povas preni neniun decidon pri tiel malproksima dato.

S-ro KRUDNICKI proponas la urbon Krakaŭ por la oka Kongreso, kaj diras, ke en 1912, oni festos la du-dek-kvinan datrevenon de Esperanto, kaj konvenas ke tiu festo okazu en la lando de la deveno de Esperanto, t. e. en Polujo.

* * *

S-ro MUDIE proponas kaj la Kongreso akceptas :

1. Ke oni esprimu la varman esperon, ke la *Granda Biblia Societo* povos entrepreni tujan eldonon de la tuta Biblio en Esperanto.
2. Ke oni rekomendu la uzon de *metalaj afiŝoj* por la pordoj de la sidejoj de ĉiuj esperantistaj institucioj.
3. Ke oni sendu *salutajn telegramojn* al S-roj Kabe kaj Pollen.

* * *

S-ro BERLANT komunikas al la Kongreso decidon de la *Kongreso de Keramistoj* de Firenze, kiu akceptis Esperanton kaj esprimis la deziron, ke la naciaj federacioj keramistaj propagandu ĝin.

* * *

La kunsido estas fermata je la 12-a horo.

Kvara Labora kaj Solena Ferma Kunsido
(11 septembro 1909)

La kunsido estas malfermita je la 4-a horo, en la Palaco de Belartoj.
S-ro F. PUJULA prezidas.

S-ro G. CHAVET, sekretario, legas la protokolon de la dua labora kunsido. Ĝi estas aprobita sen rimarko.

* *

S-ro G. CHAVET, je la nomo de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, legas la tekston preparitan pri la demando de centra financa organizo, tekston, kiu estis cetere disdonita al ĉiuj kongresanoj, antaŭ tri tagoj, kaj afiŝita en la lokoj de la Universitato. Jen tiu teksto :

La Kvina Kongreso de Esperanto esprimas la deziron, ke la diverslandaj societoj por la propagando de Esperanto kreu, per proporcia balotado, Internacian Konsilantaron, por zorgi pri la financaj rimedoj de niaj oficialaj Institucioj : Lingva Komitato kaj Konstanta Komitato de la Kongresoj.

En tiun Konsilantaron, oni elektos unu anon por mil anoj de propagandaj societoj.

S-ro TH. CART deklaras, ke li tute aprobas tiun tekston kaj esperas, ke ĝi estos akceptata unuvoĉe.

S-ro MUDIE, je la nomo de la Angloj, deklaras, ke tiu teksto tute kontentigas lin.

S-ro A. MARICH, je la nomo de la hungaroj, ankaŭ aprobas la tekston.

La proponita teksto estas unanime akceptata de la Kongreso.

* *

S-ro G. CHAVET, sekretario, prezentas proponon de germanaj kongresanoj, kiuj sciigis, ke kelkaj jurnalaj publikigis falsan malveran ciferon, kiel nombron de partoprenintoj de la Kvina Kongreso, kaj deziras, ke la Loka Komitato diru la ĝustan nombron da ili.

S-ino Germaine REBOURS DE PUJULA, sekretariino de la Loka Komitato, diras ke la nombro de la Kongresanoj estas certe pli granda ol 1300.

* *

S-ro Doktoro DOR proponas, ke la Kongreso esprimu la deziron,

ke la kompetentaj personoj proponu Doktoron Zamenhof por la Premio Nobel de la Paco.

Doktoro ZAMENHOF diras, je tio estas privata afero, kaj ke li opinias, ke pli bone estus ke la Kongreso ne ĝin diskutu.

S-ro MUDIE demandas, ĉu tio estas nur la privata opinio de Doktoro ZAMENHOF aŭ ĉu li tion oficiale petas de la Kongreso.

Doktoro ZAMENHOF diras, ke li deziras nur paroli kiel privatulo kaj nenion trudi al la Kongreso, sed ke li tamen esprimis sian privatan personan deziron, ke oni ne diskutu la proponon de Doktoro DOR.

* * *

S-ro R. DE SAUSSURE, sekretario de la Sciencasocio, raportas pri la kunsidoj de la Sciencasocio en Barcelono. Li anoncas ke baldaŭ aperos unua teknika vortaro kaj diras, ke la nova prezidanto de la Sciencasocio estas Profesoro Huntington, de la Universitato de Harvard, en Usono.

* * *

S-ro V. DE ALLENDE prezentas proponon, ke la Kongreso esprimu la deziron ke Esperanto estu enkondukata en ĉiuj hispanaj lernejoj.

S-ro Doktoro BREMON Y MASGRAU kontraŭbatalas tiun proponon, kiu ne estas konforma al la leĝoj de la lando, kiuj postulas ke oni sin turnu, unue, al deputatoj aŭ kompetentaj personoj.

S-ro ALLENDE respondas, [ke li kompreneble deziras prezenti la deziron de la Kongreso al la deputatoj.

S-ro PUJULA, prezidanto, rimarkigas ke tiu propono ne estis antaŭe sendita al la Konstanta Komitato de la Kongreso, kaj ke ĝi ne povis sekve esti antaŭe esplorita. Li proponas, kaj la Kongreso aprobas, ke ĝi ne estu diskutata.

* * *

S-ro G. CHAVET, sekretario, proponas, kaj la Kongreso akceptas, la jenan redaktaĵon, por la oficialaj deziroj kaj decidoj de la kvina Kongreso.

Pri la propagando.

La Kongreso dankas S-rojn Mann, Blaise, Mudie, Cart, Allende kaj Privat, pro iliaj interesaj komunikoj pri la ĝenerala propagando.

Pri insignoj.

La Kongreso atentas, kun granda intereso, pri la modeloj de insignoj, kiujn la Centra Komercejo por Esperantujo prezentis al ĝi.

Pri internacia Restadejo.

La Kongreso sciiĝas kun plezuro pri la intenco de la Grupo de Godesberg starigi konstantan centran restadejon por la esperantistoj.

Pri la Lingva Komitato.

La Kongreso aŭdis kun granda intereso la raporton de Sinjoro Prezidanto de la Lingva Komitato kaj de la Akademio kaj varme aprobas ĝiajn konkludojn.

Pri la Estontaj Kongresoj.

La Kongreso decidas, ke la sesa Kongreso okazos en Washington, laŭ la propono de la Asocio de Norda Ameriko, en 1910, kaj ke la sepa Kongreso okazos en Antverpeno, en 1911, laŭ la propono de la Belga Ligo. Ĝi notas, por la postaj jaroj, la invitojn por okazigi la kongresojn en la urboj München, Graz, Praha, Wien kaj Krakau.

Pri la Konstanta Komitato de la Kongresoj.

La Kongreso, laŭ la Kongresa Regularo, aprobas la elektojn de novaj anoj de la Komitato, faritajn de la Kvara Kongreso, kaj elektas, kiel novajn anojn de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, komisiita por organizi la estontajn kongresojn kaj plenumi la decidon kaj dezirojn de la nuna Kongreso.

S-POR VAN DER BIEST-ANDELHOF.

S-POR OSCAR VAN SCHOOR.

por la sepa Kongreso.

Pri traduko de la Biblio.

La Kongreso esprimas la esperon, ke la Brita Biblia Societo povos entrepreni la tujan eldonadon de la tuta Biblio en Esperanto.

Matelaj afiŝoj.

La Kongreso rekomendas al la propagandaj societoj la uzon de verdaj emajlitajn metalajn afiŝojn por surmeti sur la eksteraj pordoj de la ŝidejoj.

Pri Centra Organizo.

La Kvina Kongreso de Esperanto esprimas la deziron, ke la diverslandaj societoj por la propagando de Esperanto, kreu per proporcia balotado, Internacian Konsilantaron, por zorgi pri la financaj rimedoj de niaj oficialaj institucioj. (Lingva Komitato kaj Konstanta Komitato de la Kongresoj).

En tiun konsilantaron, oni elektos unu anon por mil anoj de propagandaj societoj.

*
* *

S-ino Germaine REBOURS DE PUJULA, sekretariino, proponas, ke la Kongreso donu varman aplaŭdon, en la honoro de samideanoj, kiuj faris tre gravajn servojn al la kongresanoj, dum la tuta Kongreso, t. e. la urbaj esperantistaj gvardianoj, kiuj zorgis, kun granda sindono, pri la bona ordo de ĉiuj manifestacioj. La Kongreso varme aplaŭdas.

S-ro Subestro de la Urba Gvardio dankas la Kongreson, je la nomo de siaj kolegoj.

S-ro ALFONSO SABADELL, vicprezidanto, sendas memoron kaj saluton al ĉiuj esperantistoj, kiuj ne povis ĉeesti tiun Kongreson.

S-ro Carlo BOURLET, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, ĝojas pri la granda sukceso de tiu Kongreso, ne nur de la laboroj kunsidoj, en kiuj oni faris tre fruktodonan laboron, sed ankaŭ de la belegaj festoj. Li dankas pro tio, je la nomo de la tuta Kongreso, la Barcelonajn amikojn, kiuj, per sia longa klopodado, malgraŭ la multaj malfacilaĵoj, sukcesis atingi tiun belan rezultaton.

S-ro F. PUJULA, prezidanto de la Kongreso kaj de la Loka Komitato, je la nomo de tiu Komitato, dankas varme la esperantistojn kiuj venis en Barcelonon. Li esperas ke ili forportos bonan memoron pri la Kvina Kongreso, kaj li certigas ke, se iliaj korpoj foriras, iliaj spiritoj restos ĉiam en tiu urbo, kaj ke ili neniam estos forgesitaj. Li dankas ankaŭ la diversajn aŭtoritatojn, kiuj faciligis la Kongreson kaj alportis al ĝi multvalorajn apogojn. Fine, li donas la parolon al Doktoro Zamenhof, por diri la lastajn fermajn vortojn.

Doktoro ZAMENHOF certigas, ke ni ĉiuj forportos bonan memoron pri tiu Kvina Kongreso. Li konstatas, kun ĝojo ke tiu Kongreso laboris en tre granda paco, kaj ke ĉiuj diskutoj fariĝis en plej frataj sentoj. Li aldonas, ke tiu Kongreso ankaŭ estos tre efika por nia propagando, kaj li citas, kiel ekzemplon, ian enlandan gazeton, kiu, en la komenco, parolis malfavore pri nia movado kaj kiu poste tute ŝanĝis sian opinion.

Li deziras al ĉiuj kongresanoj feliĉan vojaĝon por ilia reiro en la hejmojn kaj li deklaras, ke la Kvina Kongreso estas fermita.

La Sekretarioj :

Gabriel CHAVET,
Germaine REBOURS DE PUJULA.

La Prezidanto :

Frederiko PUJULA Y VALLÈS.

LIBRAIRIE DE L'ESPERANTO

15, Rue Montmartre. 15 — PARIS (1^{er} arr.)


GRAMMAIRE & SYNTAXE D'ESPERANTO

de A. ESSELIN.

Libro. 112 paĝoj, 13 × 19 cm. Prezo : Fr. 1,75.

Cours à la fois vraiment complet et à la portée de tous. Gros texte pour les règles. Petit texte pour les détails et difficultés. Liste des prépositions, adverbes, conjonctions, etc. Explication détaillée des affixes. Versification.

EN SVISLANDO



Alpa gvidisto.

✻

Kvin Rakontoj
elektitaj kaj tradukitaj
de
E. RAMO

104 paĝoj 15 × 22 c/m.

ILUSTRITA LUKSE

Prezo : fr. 3 »

✻

Legi « *En Svislando* » estas plezuro por la okuloj kaj por la cerbo.

INTERNACIA SCIENCA REVUO

OFICIALA MONATA ORGANO

DE LA

INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA

Administrejo kaj Redaktejo :

SCIENCA OFICEJO, 8, rue Bovy-Lysberg,

GENEVO-SVISLANDO

JARA ABONO : 2,75 sm. (1 sm. = 100 sd = frs 2,50 = šil. 2. = mk 2.)

UNU NUMERO : 25 sd.

Oni abonas ĉe la *Sciencia Oficejo*, 8, rue Bovy-Lysberg, Ĝenevo (Svisujo) aŭ ĉe Möller et Borel, 95, Prinzenstrasse, Berlino (Germanujo); *G. Warnier et Cie*, 15, rue Montmartre, Parizo (Francujo); "*Brita Esperantista Asocio*", 133-6 High Holborn, Londono W. C. (Anglujo); *Raffaello Giusti*, Livorno (Italujo); *M. Arct*, Warszawa (Polujo); *J. Espasa*, 579, Cortes, Barcelona (Hispanujo); *A.-F. Høst et Son*, Kjøbenhavn (Danujo); *Libreldonejo*, Moskva (Rusujo).

LIBRELDONEJO "ESPERANTO"

Moskva (Rusujo), Valovaja ul., dom Serpuhovskogo mon., kv. 5. sciigas al la rusa esperantistoj pri sia fondiĝo.

Ĝi jam eldonis :

N ^o 1. L.-F. TIROV. — Esperanto en dek lecionoj.	30 kop.
N ^o 2. L.-T. TIROV. — Vortaro esperanta-rusa	75 kop.
Propagandaj poŝtkartoj kun teksto.	2 kop.
Propagandaj kovertoj, kun teksto.	1 kop.
Poŝtkartoj kun portreto de D-ro L. ZAMENHOF.	3 kop.
Portretoj de D-ro L. ZAMENHOF.	25 kop.

Livre de lecture recommandé :

KARLO

par Edmond PRIVAT

L'Ouvrage contient 20 chapitres et des questionnaires qui facilitent la conversation en Esperanto.

~~~~~  
48 pages. — Prix : 0 fr. 50.

# LA BELA MONDO

LUKSE ILUSTRITA MONATA GAZETO

*aperas la 15<sup>an</sup> de ĉiu monato.*


Abonprezo : Por unu jaro..... 7,50 Fr.

— Por duonjaro..... 3,75 Fr.

Redakcio : D<sup>ro</sup> Albert SCHRAMM, Dresden.

Presejo kaj eldonejo : F. Emil BODEN, Dresden, Bismarckplatz, 12.

## LA MASINO « DUPLEX » POR ADICII



FACILA KONTROLO

~~~~~  
RAPIDA

~~~~~  
DAŬREBLA

~~~~~  
FORTIKA

~~~~~  
PRAKTIKA

~~~~~  
MALPEZA

~~~~~  
MALGRANDA

~~~~~  
GARANTITA

~~~~~  
Prezo : **300** frankoj

por la modelo kun 9 kolonoj.

« **DUPLEX** » Modelo kun 5 kolonoj.

Tempo sparita = Mono gajnita

Gesellschaft für Maschinenbau und elektrische Neuheiten  
KARLSBAD, 22, BERLIN, W. 35

# UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

---


U. E. A. celas plifaciligi la ĉiuspecajn rilatojn inter diverslingvanoj kaj krei fortikan ligilon de solidareco inter siaj membroj. Ĝi organizas per Esperanto diversajn internaciajn servojn tuj uzeblajn de la personoj, kiuj vojaĝas, komercas, korespondas, rilatas kun alilingvanoj pri ĉiuspecaj fakoj. Ĝi klopodas por starigi en ĉiuj lokoj konsulojn, Esperanto-Oficejojn, kiuj helpas al la trapasantaj samideanoj; ĝi organizas ekskursojn, esperantajn libertempajn koloniojn, Esperanto-hotelaron, komercan servon por ĉiea disdonado de reklamiloj, k. t. p.

Ĉiu membro ricevas membrokarton, kiu donas al li la rajton senpage uzi la servojn de U. E. A. La kotizaĵo por 1908-1909 estas 36 Sd. (Fr. 0, 90).

Por ĉiuj informoj sin turni al la lokaj Delegitoj kaj Subdelegitoj, aŭ al ESPERANTIO, 8, rue Bovy-Lysberg, GENÈVE (Suisse).

*Ĉiuj grupoj, kiuj ne ankoraŭ elektis Delegiton al U. E. A. estas petataj tion fari kiel eble plej baldaŭ.*

*Ĉiuj izolaj Esperantistoj, kiuj bonvolus akcepti la taskon de Subdelegito en sia loko, skribu al la supra adreso.*



Desegnoj de Tornié Esquius

**Malkara sed bona !**


**LA GRAFO  
ERARINTA**

de F. Pujula Valles

PREZO : **50** CENTIMOJ

Librairie de l'Esperanto, Paris

# LA STENOFILO



estas maŝino kiu ebligas skribi pli ol 200 vortoj en unu minuto.


Ĝi estas malpeza kaj funkcias sen bruoj.

Per ĝi oni povas stenografii ĉiujn lingvojn. (La maŝino estas uzita de la komenco ĝis la fino de l'Kongreso en Cambridge, por stenografii ĉiujn paroladojn.)

La ilustrata katalogo estas sendata senpage. Sin turni al :

*G. WARNIER, 15, rue Montmartre, Paris.*

# LA UNIVERSALA ŜLOSILO DE ĈEFEC



Ŝlosiloj..... 10 ekz. fr. 0,50 — 100 ekz. fr. 3,50.  
Tutoj..... 10 ekz. fr. 1, » — 100 ekz. fr. 7, ».  
Anekdotoj .... 1 ekz. fr. 0,35 — 10 ekz. fr. 3, ».  
Ŝlosilaro (ĉiuj aperintaj ŝlosiloj en elegante bindita volumo)..... 1 ekz. fr. 1,50

Granda elekto de insignoj.

Petu plenan prezaron ĉe

**INTERNACIA PROPAGANDEJO ESPERANTISTA**

Merton Abbey, London S. W.

ĈIO estas ankaŭ havebla ĉe Esperanto-Oficejoj

kaj **LIBREJO G WARNIER & K<sup>o</sup>**

15, rue Montmartre, Paris

# LA INTERNACIA TRINKAJO !

# VISKIO ESPERANTO

Registered trade mark

N<sup>o</sup> 270 042

Registered label N<sup>o</sup> 272 434

Marque déposée

N<sup>o</sup> 13 195

Bonvolu observi la verdan stelon kaj la nomon **Esperanto** sur la aŝiseto, kiu estas desegnita kiel propagandilo.

**BUCHANAN, SCOTT & C<sup>o</sup>**, Garthland street

**GLASCOW** (Skotlando).

# ESPERANTISTOJ! ATENTU!

La plej bona skribmaŝino estas la

**“ YOST ”**

kun esperanta klavaro

*Mendebla de la LIBRAIRIE DE L'ESPERANTO  
15, Rue Montmartre, PARIS*


La Kompanio de la skribmaŝinoj “ YOST ” kreis specialan klavaron kiu ebligas skribi Esperanton.

La **LIBRAIRIE DE L'ESPERANTO**, sola agento por la vendo de tiu nova maŝino, respondas senpage al ĉiuj personoj, kiuj deziras detalajn klarigojn.

Per la klavaro oni ricevas la literojn Ĉ, ĉ, G, ĝ, H, h, Ĵ, ĵ, S, ŝ, Ŭ, ŭ krom ĉiuj kutimaj literoj kaj komercaj signoj.

La Esperantistoj povas vidi la funkciadon de la skribmaŝino YOST ĉe la **Librairie de l'Esperanto, Paris**, kiu uzas ĝin ekskluzive por sia korespondado.

**RENOVIGITA ! PLIBONIGITA !**



**日本エスペラント**

**Internacia ilustrata monata revuo  
Oficiala organo de Japana Esperantista Asocio**

**SOLA KAJ UNUA ESPERANTA GAZETO EN LA EKSTREMA ORIENTO  
LA PLEJ INTERESA, LA PLEJ ORIGINALA  
LA PLEJ BONA PROPAGANDILO**

Ĉiuj Esperantistoj, ĥiuj volas koni la japanon kaj Japanujon, la belan landon de l'Leviĝanta Suno, kaj ĥiuj volas scii pri la Ekstrema Oriento, nepre devas legi ĝin.

Ĝi baldaŭ faros tre interesan konkurson kun belaj premioj, al kiu tutmondaj abonintoj (nur abonintoj) povos partopreni.

**Jara abono, sangita de 1909 : 5 fr. (2 sm.)**

Nun abonante oni ricevos la plenan jarkolekton de 1909

Por specimeno oni sendu respondkuponon

**Abonu rekte al « Japana Esperantiste » Marunouchi,  
TOKIO, Japanujo.**

Aŭ ĉe Librejo de Esperanto, 15. rue Montmartre, Paris, Francujo.